



EL POPOLA ĈINIO


Vortoj de Prezidanto

Maŭ Zedong

Estas tre necese, ke intelektaj gejunuloj iru al la kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Persvadu la kadrojn kaj aliajn homojn en la urboj sendi al la kamparo siajn gefilojn, kiuj finis studon en elementaj aŭ superaj mezlernejoj, aŭ altaj lernejoj. Ni faru mobilizon. Kamaradoj de ĉiuj lokoj en la kamparo devas bonvenigi ilin.



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ plej zorgas pri la kreskado de la juna generacio; dum la granda kultura revolucio, nia amata Prezidanto Maŭ okfoje revuis niajn revoluciajn gejunulojn kaj junajn ruĝajn gvardianojn. En la bildoj: Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin revuas sur pordego Tian-anmen revoluciajn gejunulojn kaj junajn ruĝajn gvardianojn.





Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj kadroj de Ĉangĝeng-komunumo de Ĵenhuaj-gubernio, Guĵōu-provinco, varme bonvenigas la intelektajn gejunulojn kiuj venas por fikse loĝiĝi tie kaj kune konstrui novan socialisman kamparon.



Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, intelektaj gejunuloj de Gi-an-gubernio, Gilin-provinco, venas al kamparo por tie fikslōiĝi kaj akcepti reedukon ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

La Direkto de la Junula Movado

Maŭ Zedong

Tio ĉi estas parolado farita de kamarado Maŭ Zedong je la 4-a de majo, 1939, ĉe la amasa kunveno de junuloj en Jan-an por memori la 20-an datrevenon de la Movado de 4-a de Majo. En tiu ĉi parolado kamarado Maŭ Zedong disvolvis la ideojn pri la problemo de la ĉina revolucio.

HODIAŬ estas la 20-a datreveno de la Movado de 4-a de Majo, kaj ĉiuj niaj junuloj de Jan-an okazigas ĉi tie tiun memorkunvenon. Mi volas paroli pri kelkaj problemoj koncerne al la direkto de la junula movado en Ĉinio.

Unue, nun la 4-a de majo estas difinita kiel la Ĉina Junula Tago, kaj tio estas tute ĝusta.¹ Forpasis jam 20 jaroj de post la Movado de 4-a de Majo, sed nur ĉijare, tiu tago estas difinita kiel la Junula Tago en la tuta lando, kaj tiu afero havas gravan signifon. Alivorte, ĝi montras, ke nia ĉina popol-demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo baldaŭ atingos turnopunkton. Dum la lastaj kelkdek jaroj tiu revolucio plurfoje malvenkis, sed nun

necesas ŝanĝi tiun staton, ŝanĝi ĝin al venko, sed ne al plua malvenko. Nun, la ĉina revolucio marŝas antaŭen, antaŭen al venko. La multfojaj malvenkoj en la historio ne povas kaj absolute ne devas daŭri plu, sed devas esti turnitaj al venko. Do, ĉu nun la ŝanĝo jam aperis aŭ ne? Ne. Nun tiu ĉi ŝanĝo ankoraŭ ne alvenis, kaj nun ni ankoraŭ ne venkis. Tamen venkon ni povas gajni. Ĝuste en la Kontraŭjapana Rezistmilito ni klopodas atingi la turnopunkton de malvenko al venko. La Movado de 4-a de Majo oponis kontraŭ la naciperfida registaro, la registaro kiu en koluzio kun imperiismo forvendis la naciajn interesojn, la registaro kiu subpremis la popolon. Ĉu tia registaro devas esti oponata aŭ ne? Se ne,

do la Movado de 4-a de Majo estas simple erara. Estas evidente, ke tia registaro nepre devas esti oponata kaj la naciperfida registaro devas esti faligita. Rigardu, jam longe antaŭ la Movado de 4-a de Majo, D-ro Sun Jatsen estis ribelulo kontraŭ la registaro de sia tempo, li oponis la registaron de King-dinastio kaj renversis ĝin. Ĉu li tion faris prave aŭ ne? Mi opinias, ke li faris tute prave. Ĉar la registaro, kiun li oponis, ne rezistis kontraŭ imperiismo sed konspiris kun ĝi, kaj ne estis revolucia registaro sed registaro kiu subpremis revolucion. La Movado de 4-a de Majo faris ĝuste laboron oponi naciperfidan registaron, tial ĝi estas movado revolucia. La junuloj de la tuta Ĉinio devas tiel rigardi la Movadon de 4-a de Majo. Hodiaŭ, kiam la popolo de la tuta lando militante leviĝis por rezisti kontraŭ Japanio, ni decidus nepre venki la japanan imperiismon, kaj ne toleras iujn ajn naciperfidulojn, ne permesas al la revolucio ree malvenki, memorante la spertojn de malvenkoj de la revolucio en la pasinteco. La junuloj de la tuta lando, krom parto el ili, ĉiuj vekiĝis kaj havis la decidon certe venki, kion montris la difino de la kvara de majo kiel Junula Tago. Ni marŝas antaŭen laŭ la vojo al venko. Kondiĉe ke la popolo de la tuta lando kune klopodas, la ĉina revolucio certe venkos en la procezo de la rezistmilito kontraŭ Japanio.

Due, kontraŭ kio oponas la ĉina revolucio? Kio estas la objektoj de la revolucio? Kiel ĉiuj scias, unu estas imperiismo, kaj la alia—feŭdismo. Kio estas la objektoj de la nuna revolucio? Unu estas la japana imperiismo, kaj la alia—la ĉinaj naciperfiduloj. Por fari revolucion, ni nepre devas faligi la japanan imperiismon kaj la ĉinajn naciperfidulojn. Kiu faras la revolucion? Kio estas ĝia ĉefa forto? Ĝi ja estas la ĉinaj ordinaraj popoloj. La movforto de la revolucio estas la proletaro, la kamparanaro kaj ĉiuj membroj el aliaj klasoj, kiuj volas oponi

kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo; ĉiuj tiuj estas revoluciaj fortoj por oponi kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Sed kiuj, inter tiuj ĉi multaj, estas la baza forto, la spino de la revolucio? Estas la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj konsistigas 90 procentojn de la tutlanda loĝantaro. Kio estas la karaktero de la ĉina revolucio? Kian revolucion nun ni faras? Nun ni faras demokratian revolucion kun burĝa karaktero, kaj ĉio, kion ni faras, ne transiris ĝian amplekson. Ĝenerale, nun ni ankoraŭ ne devas detrui privatan posedsismon de la burĝaro, kaj tio, kion ni volas detrui, estas imperiismo kaj feŭdismo. Tio ja estas nomata la demokratia revolucio kun burĝa karaktero. Tamen tiun revolucion la burĝaro jam ne kapablas plenumi, ĝi povas esti plenumita nur per la klopodo de la proletaro kaj la vastaj popolamasoj. Kio estas la celo de tiu revolucio? La celo estas faligi imperiismon kaj feŭdismon kaj starigi popol-demokratian respublikon. Tia popol-demokratia respubliko ĝuste estas la respubliko de la revoluciaj Tri Popolaj Principoj. Ĝi estos diferenca de la nuna duonkolonia kaj duonfeŭda stato kaj ankaŭ de la estonta socialisma sistemo. En la socialisma socisistemo kapitalistoj ne havas lokon, sed ili ankoraŭ devas esti permesataj ekzisti en la popol-demokratia sistemo. Ĉu ĉiam estos loko por kapitalistoj en Ĉinio? Ne, certe ne en la estonteco. Tiel estos ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la tuta mondo. En la estonteco, en ĉiu lando, ĉu en Britio, Usono, Francio, Japanio, Germanio aŭ Italio, ne estos iu ajn loko por kapitalistoj, kaj ankaŭ en Ĉinio ne estos escepto. Sovetunio estas lando kiu jam konstruis socialismon, kaj estas sendube ke ĝin sekvos estonte la tuta mondo. Ĉinio certe disvolviĝos en socialismon en la estonteco, kaj tio estas leĝo renversebla de neniuj. Tamen en nuna stadio nia tasko ne estas efektiviĝi socialismon, sed detrui imperiismon kaj feŭdismon, ŝanĝi la nunan duonkolonian kaj

duonfeŭdan pozicion de Ĉinio kaj starigi popol-demokratian sistemon. Por tio la junuloj de la tuta lando devas klopodi.

Trie, kio estas la spertoj kaj lecionoj de la ĉina revolucio en la pasinteco? Tio estas ankaŭ grava problemo kiun la junuloj devas kompreni. Por precize diri, la burĝa demokratia revolucio kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo en Ĉinio komenciĝis de D-ro Sun Jatsen kaj havas historion de pli ol 50 jaroj; kaj la agreso al Ĉinio fare de kapitalismaj eksterlandoj jam havas historion de preskaŭ 100 jaroj. Dum tiuj 100 jaroj, komence estis la Opia Milito kontraŭ la agreso de Britio, poste sekvis la Milito de la Tajping-a Ĉiela Regno, la Ĉina-Japana Milito de 1894, la Reforma Movado de 1898, la Jihetuan-movado, la Revolucio de 1911, la Movado de 4-a de Majo, la Norden-Ekspedicio kaj la milito de la Ruĝa Armeo — kvankam ĉiuj tiuj ĉi bataloj en Ĉinio diferencis unu de alia, tamen ilia komuna celo estis rezisti kontraŭ la eksterlandaj malamikoj aŭ ŝanĝi la ekzistantan staton. Sed nur de D-ro Sun Jatsen komenciĝis pli klare difinita burĝa demokratia revolucio. Dum la lastaj 50 jaroj la revolucio komencita de D-ro Sun Jatsen havis siajn venkojn kaj malvenkojn. Rigardu, la Revolucio de 1911 forpelis la imperiestron, ĉu tio ne estas venko? Ĝia malvenko aludas al tio, ke ĝi forpelis nur unu imperiestron, kaj Ĉinio, kiel antaŭe, ankoraŭ estis sub la subpremado de imperiismo kaj feŭdismo, kaj la revolucia tasko kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo restis neplenumita. Kio estis la celo de la Movado de 4-a de Majo? Ĝia celo ankaŭ estis oponi kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, tamen ankaŭ ĝi malvenkis, kaj Ĉinio, kiel antaŭe, restis sub la regado de imperiismo kaj feŭdismo. Estis same ankaŭ pri la revolucio de la Norden-Ekspedicio; ĝi gajnis venkon, sed denove malvenkis. De kiam Kuomintango sin turnis kontraŭ la Komunista Partio,² Ĉinio denove falis sub la superregon de imperiismo kaj feŭ-

dismo. Kaj sekve de tio ni estis devigitaj konduki la dekjaran militon de la Ruĝa Armeo. Tamen, ankaŭ tiu dekjara batalo plenumis la revolucian taskon nur en partoj de Ĉinio, sed ne en la tuta lando. Se ni resumas la revolucion dum la pasintaj kelkdek jaroj, ni do povas diri ke ni gajnis nur provizorajn kaj partajn venkojn, sed ne eternan kaj tutlandan venkon. Kiel D-ro Sun Jatsen diris: “La revolucio ankoraŭ ne sukcesis, ĉiuj kamaradoj devas daŭre klopodi.” Nun estas la demando: Kial la ĉina revolucio, post dekoj da jaroj de batalo, ankoraŭ ne atingis sian celon ĝis nun? Kio estas la kialoj? Mi opinias, ke estas du kialoj: unue, la forto de la malamiko estis tro potenca; due, nia propra forto estis tro malpotenca. Ĉar unu estis potenca kaj la alia malpotenca, tial la revolucio ne sukcesis. Parolante ke la forto de la malamiko estas tro potenca, ni volas diri, ke la forto de imperiismo (la ĉefa faktoro) kaj feŭdismo estas tro potenca. Parolante ke nia propra forto estas tro malpotenca, ni volas diri, ke ni havas malfortecon manifestiĝantan en milita, politika, ekonomia kaj kultura flankoj; tamen la ĉefa kialo kuŝas en tio, ke la laborantaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj, kiuj konsistigas 90 procentojn de la tutlanda loĝantaro, ankoraŭ ne estas mobilizitaj, tial manifestiĝas la malforteco, kaj la tasko oponi kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo ne povas esti plenumita. Se ni resumas la revolucion de la pasintaj kelkdek jaroj, ni povas diri, ke la popolo tra la tuta lando ne estas plene mobilizita, kaj ke la reakciuloj ĉiam oponas kaj detruas tiun ĉi mobilizadon. Nur per mobilizado kaj organizado de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kiuj konsistigas 90 procentojn de la tutlanda loĝantaro, eblas faligi imperiismon kaj feŭdismon. En sia testamento D-ro Sun Jatsen diris:

Dum 40 jaroj mi dediĉis min al la afero de la nacia revolucio kun la celo

gajni liberecon kaj egalecon por Ĉinio. Akumulinte spertojn de tiuj 40 jaroj, mi profunde komprenas, ke por atingi tiun celon estas nepre necese vekti la popolamasojn kaj unuiĝi kun la nacioj de la mondo traktantaj nin kiel egalulojn por komuna batalo.

Jam forpasis pli ol 10 jaroj post la morto de D-ro Sun Jatsen, kaj plus la de li menciitaj 40 jaroj sume forpasis pli ol 50 jaroj. Kio estas la sperto kaj leciono de la revolucio dum tiuj pli ol 50 jaroj? Fundamente, tio estas "veki la popolamasojn". Vi devas bone studi tiun lecionon, kaj ankaŭ ĉiuj junuloj de nia lando devas bone studi. La junuloj nepre devas scii, ke ni povos venki imperiismon kaj feŭdismon nur per mobilizado de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kiuj konsistigas 90 procentojn de la tutlanda loĝantaro. Estas neeble atingi la celon venki Japanion kaj konstrui novan Ĉinion, se ni ne mobilizas la laboristajn kaj kamparanajn amasojn de la tuta lando.

Kvare, mi returniĝu al la problemo pri la junula movado. En tiu ĉi sama tago antaŭ 20 jaroj, okazis en Ĉinio la granda evento, nomata en la historio kiel la Movado de 4-a de Majo kiun partoprenis lernantoj, kaj ĝi estas movado kun grava signifo. Kian rolon ludis la ĉinaj junuloj de post la Movado de 4-a Majo? Ili ludis ian avangardan rolon, kaj tion rekonis ĉiuj homoj en la tuta lando escepte de la obstinuloj. Kio estas avangarda rolo? Tio signifas ludi la rolon de antaŭirantoj kaj marŝi en la plejfronto de la revoluciaj vicoj. En la kontraŭimperiismaj kaj kontraŭfeŭdismaj vicoj de la ĉina popolo estas armeo, kiu konsistas el ĉinaj junaj intelektuloj kaj lernantoj. Tiu ĉi armeo estas sufiĉe granda kaj, krom la mortintaj, nun nombras plurajn milionojn. Ĝi estas armeo sur unu el la frontoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kaj ankaŭ estas grava armeo. Sed tiu armeo sola ne sufiĉas; ni ne povas venki la malamikojn apogante nin nur

sur ĝi, ĉar ĝi ankoraŭ ne estas la ĉefa forto. Kiuj do estas la ĉefa forto? La laboristaj kaj kamparanaj amasoj. La ĉinaj junaj intelektuloj kaj lernantoj nepre devas iri inter la laboristajn kaj kamparanajn amasojn por mobilizi kaj organizi la laboristajn kaj kamparanajn amasojn, kiuj konsistigas 90 procentojn de la tutlanda loĝantaro. Sen la laboristoj kaj kamparanoj kiel la ĉefa forto kaj apogante nin nur sur la armeo de la junaj intelektuloj kaj lernantoj, ni ne povas gajni venkon super imperiismo kaj feŭdismo. Tial la junaj intelektuloj kaj lernantoj de la tuta lando nepre devas kombiniĝi kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj fariĝi unu tuto kun ili, kaj nur tiam povas formiĝi potenca armeo. Tio estas armeo kun centmilionoj da personoj! Nur kun tiu grandega armeo, ni povas frakasi la firman pozicion de la malamikoj kaj iliajn lastajn fortikaĵojn. Taksante la pasintan junulan movadon el tiu ĉi vidpunkto, ni devas montri unu eraran tendencon. Tio estas ke en la junula movado dum la pasintaj kelkdek jaroj, parto da junuloj ne volis kombiniĝi kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj oponis kontraŭ iliaj movadoj; tio estas kontraŭfluo en la junula movado. Fakte, ili estis tro neinteligentaj ke ili rifuzis kombiniĝi kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kiuj konsistigas 90 procentojn de la tutlanda loĝantaro, kaj tute kontraŭstaris ilin. Ĉu tiu fluo estas bona aŭ ne? Laŭ mia opinio, ĝi estas nebona, ĉar ilia opono kontraŭ la laboristoj kaj kamparanoj egalas tiun kontraŭ la revolucio, tial ĝi estas kontraŭfluo en la junula movado. Tia junula movado ne havos bonan rezulton. Antaŭ kelkaj tagoj mi skribis mallongan artikolon,³ en kiu mi diris:

En la fina analizo, la dividlinio inter la revoluciaj intelektuloj kaj nerevoluciaj aŭ kontraŭrevoluciaj intelektuloj estas tio, ĉu ili volas kaj praktikas kombiniĝon kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj.

Ĉi tie mi elmetis unu kriterion, kiu, laŭ mia opinio, estas unika kriterio. Kion oni prenu kiel kriterion por juĝi, ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne? Per kio oni lin distingu? La ununura kriterio estas, ĉu li volas aŭ ne volas kaj praktikas aŭ ne praktikas kombiniĝon kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Kiu volas kaj praktikas kombiniĝon kun la laboristoj kaj kamparanoj, estas revolucia, alie, estas nerevolucia aŭ kontraŭevolucia. Se hodiaŭ li kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, do hodiaŭ li estas revolucia; sed se morgaŭ li ĉesos tion fari aŭ, male, subpremos la ordinarajn popolanojn, tiam li estos nerevolucia aŭ kontraŭevolucia. Iuj junuloj nur parolas sur la lipoj, ke ili kredas je la Tri Popolaj Principoj, aŭ je marksismo, tamen tio nenion pruvas. Rigardu, ĉu ankaŭ Hitler ne parolis pri kredo je socialismo? Eĉ Mussolini estis ankaŭ "socialisto" antaŭ 20 jaroj! Kio estas ilia "socialismo" finfine? Nenio alia ol faŝismo! Ĉu ankaŭ Ĉen Duĥiu ne "kredis" iam je marksismo? Kion li faris poste? Li alkuris al la kontraŭevolucio. Ĉu ankaŭ Ĝang Guotaŭ ne "kredis" iam je marksismo? Kien nun li forkuris? Li dizertis kaj englitis en marĉon. Iuj homoj titolas sin mem "adeptoj de la Tri Popolaj Principoj", kaj eĉ veteranaj fideluloj al tiuj principoj; sed kion ili faris? Fakte ilia Principo de Naciismo estas konspiri kun imperiismo; ilia Principo de Demokratio estas subpremi la ordinarajn popolanojn; ilia Principo de Popola Vivo estas suĉi la sangon de la ordinaraj popolanoj ju pli multe des pli bone. Ili asertas la Tri Popolajn Principojn sur la lipoj sed rifuzas ilin en la koro. Tial, kiam ni juĝas homon, ĉu li estas falsa aŭ vera subtenanto de la Tri Popolaj Principoj, ĉu li estas falsa aŭ vera marksisto, ni bezonas nur rigardi kian rilaton li havas kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kaj tiam ni scios klare kia li estas. Tio estas la ununura

kriterio, kaj ne ekzistas iu alia. Mi esperas, ke la junuloj de la tuta lando neniam permesos sin fali en tiun malluman kontraŭfluon, kaj klare scios ke la laboristoj kaj kamparanoj estas iliaj amikoj, kaj marŝos antaŭen al la brila estonteco.

Kvine, la nuna Kontraŭjapana Rezistmilito estas nova etapo en la ĉina revolucio, kaj la etapo estas plej granda, plej vigla kaj plej viveca. En tiu ĉi etapo la junuloj portas sur si grandegan respondecon. La ĉina revolucia movado trairis multajn etapojn de batalo dum la lastaj kelkdek jaroj, sed en neniuj etapo ĝi estis tiel vasta kiel en la nuna Kontraŭjapana Rezistmilito. Ni opinias ke la nuna ĉina revolucio havas karakterizaĵon malsaman ol tiu en la pasinteco kaj ke ĝi turniĝos de malvenko al venko, tio signifas, ke la vastaj popolamasoj de Ĉinio progresis, kaj la progreso de la junuloj ja estas klara atesto. Tial, la Kontraŭjapana Rezistmilito certe venkos kaj ne povos ne venki. Kiel ĉiuj scias, la baza politiko de la Kontraŭjapana Rezistmilito estas la Kontraŭjapana Nacia Unuecfronto, kies celo estas faligi la japanan imperiismon kaj la ĉinajn naciperfidulojn, transformi la malnovan Ĉinion en la novan kaj liberigi la tutan nacion de la duonkolonia kaj duonfeŭda pozicio. Nun la neunueco en la ĉina junula movado estas serioza manko. Vi devas daŭre klo-podi por unueco, ĉar unueco estas forto. Vi devas igi la junulojn de la tuta lando kompreni la nunan situacion, efektivigi unuigon kaj rezisti kontraŭ Japanio ĝis la fino.

Kaj fine, sese, mi volas paroli pri la junula movado en Jan-an. La junula movado en Jan-an estas la modelo por la junula movado tra la tuta lando. Kaj ĝia direkto fakte estas la direkto de la junula movado de la tuta lando. Kial? Ĉar ĝia direkto estas korekta. Rigardu, la laboron por unuigo la junuloj en Jan-an ne nur faris, sed ankaŭ faris tre bone. La junuloj en Jan-an estas unuigintaj

kaj unuecaj. La junaj intelektuloj kaj lernantoj, la junaj laboristoj kaj kamparanoj en Jan-an ĉiuj estas unuiĝintaj. Grandnombro da revoluciaj junuloj el diversaj lokoj tra la tuta lando, kaj eĉ el la ĉinaj transmaraj elmigrintoj, venis al Jan-an por lerni. Plejmulto el vi ĉeestantaj la hodiaŭan kunvenon venis al Jan-an de miloj kaj dekmiloj da lioj fore, tute egale, ĉu via familinomo estas Ĝang aŭ Li, ĉu vi estas viro aŭ virino, laboristo aŭ kamparano, vi ĉiuj estas unuanimaj. Ĉu tio ankoraŭ ne povas esti rigardata kiel modelo por la tuta lando? La junuloj en Jan-an estas ne nur unuiĝintaj inter si mem, sed ankaŭ kombiniĝintaj kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, kaj tio des pli estas modelo por la tuta lando. Kion faras la junuloj en Jan-an? Ili lernas revoluciajn teoriojn kaj studas la principojn kaj metodojn por rezisti kontraŭ Japanio kaj savi la nacion. Ili kondukas produktan kampanjon kaj ekspluatis mil kaj dekmil muojn da virga tero. Ekspluatadon de virga tero kaj kulturadon de kampoj ne faris eĉ Konfucio. Kiam Konfucio funkciigis lernejon, liaj lernantoj estis ne malmultaj: “sepdek sanktuloj, tri mil disĉiploj” — sufiĉe prospera lernejo! Tamen liaj lernantoj estis tro malmultaj kompare kun tiuj en Jan-an, kaj plie ili malŝatis ian produktan kampanjon. Kiam liaj lernantoj demandis al li, kiel plugi kampon, li respondis: “Mi ne scias, mi ne estas tiel taŭga kiel kamparano.” Denove demandis la lernantoj kiel kulturi legomojn, kaj li respondis: “Mi ne scias, mi ne estas tiel taŭga kiel legomkulturanto.” La junuloj en la antikva Ĉinio, kiuj lernis ĉe sanktuloj, ne studis revoluciajn teoriojn, nek partoprenis korplaboradon. Nun en la lernejoj en vastaj regionoj tra la tuta lando oni malmulte instruas revoluciajn teoriojn kaj ne entreprenas produktan kampanjon. Nur en Jan-an kaj en la kontraŭjapanaj bazlokoj en la postfronto de la malamiko la junuloj estas tute malsamaj;

ili vere estas la avangardo en rezistado kontraŭ Japanio kaj savado de la nacio, ĉar ilia politika direkto estas korekta, kaj iliaj labormetodoj ankaŭ estas korektaj. Pro tio mi diras, ke la junula movado en Jan-an estas la modelo por la junula movado tra la tuta lando.


La hodiaŭa kunveno estas tre signifoplena. Mi parolis ĉion kion mi volis. Mi esperas ke vi ĉiuj studos la spertojn de la ĉina revolucio dum la lastaj 50 jaroj, disvolvos ĝiajn bonajn punktojn, forĵetos ĝiajn erarojn, por ke la junuloj de la tuta lando unuiĝu kun la tutlanda popolo kaj la revolucio turniĝu de malvenko al venko. Kiam la junuloj kaj la popolo tra la tuta lando estos mobilizitaj, organizitaj kaj unuigitaj, tiam la japana imperiismo estos faligita. Ĉiu junulo devas preni sur sin tiun respondecon. Nun ĉiu junulo devas esti malsama ol en la pasinteco kaj nepre devas fari firman decidon por unuigi la junulojn de la tuta lando kaj organizi la tutan popolon, nepre devas faligi la japanan imperiismon kaj transformi la malnovan Ĉinion en la novan. Jen kion mi esperas de vi.

Klarigoj

1. La 4-a de majo estis unue difinita de la junula organizo en la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono kiel la Ĉina Junula Tago. Tiam sub la premo de la patriota alttajo de la vastaj junulaj amasoj, ankaŭ Kuomintango konsentis tiun ĉi difinon. Sed poste, timante la revoluciigon de la junuloj kaj rigardante tiun difinon kiel grandan danĝeron, ĝi redifinis la 29-an de marto (la memortago pri la revoluciaj martiroj kiuj mortis en 1911 kaj estis entombigitaj en Huanghuang de Kantono) kiel la junulan tagon. Tamen en la revoluciaj bazlokoj gvidataj de la Komunista Partio la 4-a de majo kontinue estis observata kiel la Junula Tago. Kaj en decembro de 1949 post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la Administra Konsilantaro de la Centra Popola Registaro oficiale proklamis ke la 4-a de majo estas difinita kiel la Ĉina Junula Tago.

2. Tio aludas al la kontraŭrevoluciaj renversoj kiujn okazigis en 1927 Ĉiang Kajŝek en Ŝanhajo kaj Nankino kaj Vang Gingvej en Vuhan.

3. Tio aludas al la artikolo “La Movado de 4-a de Majo”.



La Revoluciaj Junuloj de la Mondo Varme Amas la Penson de Maŭ Zedong

*Maŭ Zedong,
Vi estas la nuntempa Lenin,
Al Vi salutojn sendas ni!*

*Maŭ Zedong,
Vi estas la plej granda instruanto en epoko nia
Kaj la standardportanto de l' batalo de l' popoloj
subpremataj en la mondo!*

*Estas Vi, kiu disvastigis tra l' terglob' la voĉon
de liber' kaj emancipo,*

.....

Supre estas laŭdkanto plena de revolucia entuziasmo verkita de iu juna amiko el fremda lando. Ĝi esprimas la plej sinceran senton de la revoluciaj junuloj de la mondo al Prezidanto Maŭ kaj ilian senkompare varman amon al la penso de Maŭ Zedong. Ili ĉiam pli komprenas, ke la penso de Maŭ Zedong estas la vero de revolucio, kaj ke oni povos venki ĉiujn malamikojn kaj akiri ĝisfundan liberiĝon, nur se oni posedas la nuntempan marksism-leninism — la penson de Maŭ Zedong. Tial, ili fervore studas kaj aplikas la penson de Maŭ Zedong en sia batalo.

BONE STUDI LA PENSON DE MAŬ ZEDONG

De la lastaj kelkaj jaroj, precipe de la ekdisvolvo de la granda proletara kultura revolucio

en Ĉinio, la revoluciaj junuloj en multaj landoj studas kun seriozeco verkojn de Prezidanto Maŭ. Iuj el ili organizis studrondojn de verkoj de Prezidanto Maŭ, aliaj persistas en memlerno, triaj studas kune kun siaj kamaradoj sur batalkampoj. Ili ŝatas legi precipe la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj liajn verkojn pri militaj aferoj. El sia batala praktiko, ili ĉiam pli sentas la gravecon de studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Iu dominika junulo diris: “La brilaj pensoj de Prezidanto Maŭ pri kupto de regpotenco per armitaj fortoj, pri popola milito, pri klasa batalo kaj pri sinapogo sur la propraj fortoj estas ideologia riĉaĵo por la revoluciaj popoloj.” Juna amiko el Kongolando (B) diris: “Prezidanto Maŭ pliriĉigis kaj disvolvis marksism-leninism. La penso de Maŭ Zedong estas potenca ideologia armilo por la subpremataj popoloj de ĉiuj landoj en ilia batalo por liberiĝo. ‘El la pafilo venas ŝtatpotenco’, tezo montrita de Prezidanto Maŭ, estas nerompebla vero. Por akiri sian liberiĝon, la subpremataj popoloj nepre devas agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.” Pasintjare, venis al Ĉinio grupo da francaj junuloj. Ili emocie diris al la ĉinaj kamaradoj tuj post la alveno: “Ni venas por studi la penson de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong estas lumturo por la monda revolucio.” Ili petis formi studrondon de verkoj de Prezidanto Maŭ kune



Japanaj revoluciaj popolamasoj manifestacias alte tenante la portreton de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj sloganon "Vivu la venko de la granda proletara kultura revolucio de Ĉinio!".

kun la ĉinaj kamaradoj. Ili diris: "La ruĝaj trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ multe helpas al la revolucia popolo de Francio. Spite al tio, ke imperiismo kaj reviziismo blokadis la penson de Maŭ Zedong, tamen la vero estas transportita en Francion pere de la ruĝaj trezoraj libroj de Prezidanto Maŭ. Ni devas bone studi kaj apliki ilin en nia estonta batala praktiko."

POR REVOLUCII NECESAS IRI LA VOJON DE MAŬ ZEDONG

Iu afrika studento, kiu lernas en Alĝerio, ĉiam persistas en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ jam de du jaroj. Li ne nur diligente legas, sed

ankaŭ serioze faras notojn kaj skribas siajn komprenaĵojn el studado.

Iutage jam estis profunda nokto. La samlernejanoj ĉiuj jam endormiĝis. Kun la verko de Prezidanto Maŭ *Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon* en la manoj, li venis al dormoĉambro de ĉinaj studentoj kun vigla humoro. Apenaŭ enirinte la pordon, li tuj diris: "Nun mi ankoraŭ pli firme kredas ke por revolucii necesas iri la vojon de Maŭ Zedong kaj studi la penson de Maŭ Zedong!" Parolante pri la batalo por nacia sendependeco kontraŭ koloniismo li diris: "Por sin liberigi, la popolo de nia lando nepre devas havi revolucion partion gvidatan per la penso de Maŭ Zedong kaj fari armitan batalon kaj popolan militon laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ. De nun mi portos tiun ĉi teorion inter la laboristojn kaj kamparanojn kaj faros al ili propagandon. Prezidanto Maŭ instruas al ni: 'La socialisma sistemo finfine anstataŭos la kapitalisman sistemon, tio estas objektiva leĝo sendependa de homa volo. Ne gravas kiel ajn la reakciuloj provas reteni la radon de historio, frue aŭ malfrue revolucio nepre okazos kaj certe triumfos.' Mi pli firmigis mian konvinkon kaj kredas, ke mia patrolando certe liberiĝos kaj certe estos konstruita en socialisman landon kia Ĉinio."

DISVOLVI LONGDAŬRAN INTENSAN ATAKON KONTRAŬ LA MALAMIKO

Jokonaga, kamparano en Sanrizuka de Ĉiba de Japanio, estas revolucia junulo, kiu persistas en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj klopodas gvidi sian agadon per la penso de Maŭ Zedong. Unuflanke li partoprenas produktan laboron, aliflanke li kune kun la kamparanoj faras firman batalon kontraŭ la reakcia Sato-registaro. Dum la batalo kontraŭ la konstruado de la Nova Internacia Aerodromo de Tokio fare de la uson-japana reakciularo, Jokonaga studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Longdaŭra Milito* en ligo

NEPRE FARI FIRMAN BATALON KONTRAŬ LA REVIZIISTOJ


kun la praktika batalo. Surbaze de siaj komprenaĵoj el studado li faris al la kamparanoj analizon pri la stato de la malamiko kaj tiu de la popolo en la aktuala batalo. Kaj per la penso ke “la plej riĉa fonto de povo por fari militon kuŝas en la popolamasoj”, li kuraĝigis ĉiujn fari longdaŭran batalon kaj tiel plifortigis ilian fidon al venko. Li diris: “La instruoj de Prezidanto Maŭ montris luman vojon al ni en la batalo de Sanrizuka. Por akiri venkon ni nepre devas persisti en longdaŭra batalo.”

En 1968, por tirane okupi la teron de la sanrizukaj kamparanoj kaj konstrui la aerodromon, la uson-japana reakciularo de tempo al tempo ekspedis armitajn policistojn por subpremi la kamparanajn amasojn, kiuj oponis kontraŭ la konstruado de la aerodromo. Fronte al la perfortaĵoj de la reakciuloj, Jokonaga kaj la tieaj kamparanoj persiste batalis pinto-kontraŭ-pinte sub la kuraĝigo de la penso de Maŭ Zedong. Por malhelpi la entrudiĝon de reakciaj policistoj en Sanrizuka, kune kun la kamparanoj Jokonaga starigis diversspecajn barikadojn sur la ĉefaj trafikaj linioj ĉirkaŭ Sanrizuka. Kiam la reakciaj policistoj atakis la amasojn, Jokonaga kaj liaj batalkamaradoj ekprenis akriĝitajn falĉilojn kun longa tenilo, sturmis al la reakciaj policistoj, kaj faris bravan lukton kontraŭ ili.

Tiu juna kamparano, kiu ofte portas surbruste ore brilantan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj tenas en la manoj la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, diris kun plena fido: “Nur se oni mobilizas la amasojn per la penso de Maŭ Zedong kaj faras longdaŭran intensan atakon kontraŭ la malamiko, oni povas fine venki la uson-japanan reakciularon.”

Iuloke en la Germana Demokratia Respubliko troviĝas nombro da revoluciaj junuloj, kiuj portas kun si *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong* kaj konstante studas ilin kun seriozeco. Unu el ili skribis al ĉinaj kamaradoj: “Maŭ Zedong estas la gvidanto de la revoluciuloj de la mondo. Ni ĉiuj varme amas lin. Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko. Ni nepre alte tenos la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong. Por ĉiu marksist-leninisto, lia tasko estas serioze studi verkojn de Prezidanto Maŭ.” En sia letero li skribis plie, ke li kaj liaj amikoj konstante konsultas la verkojn de Prezidanto Maŭ, kiuj helpas ilin solvi nemalmultajn malfacilajn problemojn. Kiam ili ellernis ion, ili iris inter la lernantojn kaj laboristojn por fari propagandon kaj refuti la absurdan teorion de la moderna reviziismo. Li skribis

Revoluciaj popolanoj kaj junuloj de Japanio studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong dum batalado.




kun entuziasmo: “Ni junaj marksist-leninistoj amase aperas en la batalo kontraŭ la moderna reviziismo. Ni nepre faros firman batalon kontraŭ la moderna reviziismo. Tio ĉi estas nia batala tasko.”

ELKRESKO EN LA REVOLUCIA Batalo

En 1968, en Osaka de Japanio aperis nova batala trupo el pli ol 4,000 laboristoj kaj lernantoj. En la batalo de aŭgusto por oponi la utiligon de la Internacia Aerodromo de Itami fare de la usona imperiismo en la servo al la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, ilia intensa rebato konsternis la pli ol 6,000 reakciajn policistojn, kiuj ilin ĉirkaŭatakis. La juna patriota studento Ota montris sin eksterordinare kuraĝa en la batalo. Vundite de policistoj, li ankoraŭ persistis en la batalo. Li diris: “Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke ni **devas sperti ventojn kaj pluvojn kaj iri en la mondon;**

tio, kion ni devas sperti, estas ŝtormoj kaj pluvegoj de amasa batalo, kaj tio, kion ni devas eniri, estas la vasta mondo de amasa batalo.’ Ni tiu ĉi aro da junuloj en Osaka partoprenis la revolucionan batalon ĝuste laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.” Ota diris ankaŭ, ke antaŭ ol li kaj liaj batalamikoj faris la batalon ĉe la Internacia Aerodromo de Itami, ili jam partoprenis serion da bataloj, inkluzive tiun kontraŭ la ankrado de la usona nuklea aviadilŝipo “Entrepreno” en la haveno Sasebo. Li diris kun profunda kompreno: “Niaj batalaj vicoj de junuloj en Osaka elkreskis en la batalo. En la komenco ni havis nur kelkajn personojn, sed, dank’ al tio, ke ni persistis kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong en la batalo kaj firme nin apogis sur la amasoj, tial post nur pli ol du monatoj, nia nombro multoble kreskis, kaj pli grava estas tio, ke nia revolucia batalvolo ĉiam pli fortiĝas.”

Mozambikaj batalantoj por libero studas verkojn de Prezidanto Maŭ en intertempo dum trejnado.



Himno al Ŝaŭŝan

Verkita de iu hundurasa revolucia junulo post vizito al Ŝaŭŝan, Hunan-provinco, la naskiĝloko de Prezidanto Maŭ

Ho, Ŝaŭŝan!

*Mi kantas al vi el la tuta koro,
Mi kantas pri vi, la espero de l' popolo,
Mi kantas pri vi, ĉar vi kuraĝigas la popolojn en sufero,
Ke ili perbatalu fruan venon de libero.*

Ho, Ŝaŭŝan!

*Vi, similanta al lumturo brila
Lumigas la direkton de marŝad' por la popol' de l' mond'.
Ho, Ŝaŭŝan! Kiel granda estas la feliĉo via!
Ĉar de sur via ter' leviĝas ruĝa suno sensubira,
La ruĝa suno estas Maŭ Zedong.*

Ho, Maŭ Zedong, ho, Maŭ Zedong!

*Ni huraadas al vi longe, ĝoje!
Ni kantas al vi mil-mil-foje!
Kiom da anoj de l' popoloj
De trans la oceanoj, kun ardegaj koroj
Alflugas al vi kun adoro!*

Ho, sankta lok' sublima,

*La ruĝa sun' pekina,
Al vi por ĉiam mia kantsonoro
Ŝprucos el la tuta koro!*

Al la Vasta Mondo de la Kamparo

EN la triumfa kanto por batalakiro de plenam-pleksa venko de la granda proletara kultura revolucio en nia lando, refoje nin atingis la voĉo de nia plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ: “Estas tre necese, ke intelektaj junuloj iru al la kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkam-

paranoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ni faru mobilizon. Persvadu la kadrojn kaj aliajn homojn en la urboj sendi al la kamparo siajn gefilojn, kiuj finis studon en malsuperaj aŭ superaj mezlernejoj, aŭ altaj lernejoj. Kamaradoj de ĉiuj lokoj en la kamparo devas bonvenigi ilin.” Tiu ĉi instrukcio de

Intelektaj junuloj de la Unua Mezlernejo de Sju-ĉang, Henan-provinco, ĝoje iras al la kamparo.



Prezidanto Maŭ havas grandan strategian signifon. Ĉiuj vortoj en ĝi estas saturitaj de plej granda amo, plej granda zorgo, plej granda kuraĝigo kaj plej granda stimulo al la revoluciaj junuloj, kaj ĝi estas brilanta lampo, kiu montras la vojon antaŭen por la revolucia juna generacio.

De la lastaj monatoj, en urboj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj, en la suda kaj norda Ĉinio, miloj kaj dekmiloj da intelektaj junuloj varme respondas al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ kaj amase iras al la kamparo por fikse loĝiĝi tie.

Pro kio la junaj intelektuloj devas iri al la kamparo? La kaŭzo kuŝas en tio ke en malnovaj lernejoj ili ricevis ĝenerale la burĝaran edukon. Kaj por konduki intelektajn junulojn sur la reviziisman misvojon, la granda renegato Liu Ŝaŭki disvastigis inter junaj lernantoj serion da putraj reviziismaj ideoj, kiaj “viziti lernejon por fariĝi estroj”, “iri al la kamparo por orizi sin” kaj “fari malgrandan oferon por akiri grandan profiton”. Tial estas tute necese por intelektaj junuloj iri al montoj kaj la kamparo kaj ricevi reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por plene elimini la reviziisman venenon el ilia cerbo kaj komprenigi al ili, kio estas klasoj kaj klasbatalo kaj kio estas revolucio.

La junaj intelektuloj en nia lando iras al popolaj komunumoj en la kamparo por fariĝi komunumanoj en produktaj grupoj, tio estas baza vojo por ili en ricevado de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Laŭ tiu vojo ili povos transigi sian starpunkton al la flanko de laboristoj kaj kamparanoj, enradikiĝi inter malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn dum la tuta vivo, vivi, labori kaj batali same kiel ili; nur tiamaniere ili povos defundamente ŝanĝi siajn pensojn kaj sentojn kaj vere kunfandiĝi kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pense kaj sente.

Kial nomi la iradon de intelektaj junuloj al la kamparo baza strategia principo por longa periodo? Ĉar la proletara revolucio celas realigi komunismon. Kaj unu el la kondiĉoj por realigi komunismon estas forigi la diferencojn inter la laboristaro kaj la kamparanaro, inter la urbo kaj la kamparo kaj inter la laboroj mensa kaj fizika. Konstrui novan socialisman kamparon estas ŝlosila punkto kun decida signifo en forigo de tiuj tri diferencoj. Alie, oni ne povos realigi komunismon. La absurdaĵo “viziti lernejon por fariĝi estroj”, kiun verŝis la granda renegato Liu Ŝaŭki al junuloj, kaj la absurdaĵo ke “mono estas fundamenta movforto kaj kiu posedas monon,

Intelektaj junulinoj, kiuj fiksloĝiĝis en Vanli-komunumo, Ĝin-gubernio, Liaŭning-provinco, lernas de maljuna malriĉkamparano scion de agrikultura produkto.



tiu havas feliĉon”, kiun distrumpetas la reviziisma renegata kliko de Sovetunio kaj ties presaĵoj, povas nur konduki junulojn en la marĉon de reviziismo. En la nuna Sovetunio, intelektuloj ne volas iri al la kamparo kaj la kamparaj junuloj grandnombre fluas en urbojn, tiel ke la diferencoj inter la laboristaro kaj la kamparanaro, inter la urbo kaj la kamparo kaj inter la laboroj mensa kaj fizika pli kaj pli grandiĝas. La “komunismo” sur la lipoj de la sovetunia reviziisma renegata kliko estas uzata nur por trompi la sovetunian popolon kaj kovri la veran vizaĝon de ĝia kapitalismo kaj soci-imperiismo.

Kian vojon iru la junuloj, estas grava problemo, kiu koncernas kulturadon de daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro kaj la sorton de la lando. Sub la direktado de la brila verko de Prezidanto Maŭ *La Direkto de la Junula Movado*

kaj de serio da liaj plej novaj instrukcioj, la vasta revolucia intelekta junularo de nia lando komencis brave iradi daŭre antaŭen laŭ la naviga vojo montrita de Prezidanto Maŭ por kombiniĝi kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kvazaŭ la suno en la oka aŭ naŭa horo matene, ili montras sin plenaj de freŝa vigeleco kaj revolucia junece vivforto, kaj dediĉas sin plene al la konstruado de la nova socialisma kamparo, renkonte al uraganoj de amasa batalo.

Ĉijare, en nia gazeto n-ro 1 kaj la nuna, ni kompare koncentre raportas pri tipaj ekzemploj de kombiniĝo de intelektaj junuloj de nia lando kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La legantoj povas informiĝi el ili pri la sana kreskado de intelektaj junuloj de Ĉinio, sub la edukado kaj helpado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Intelektaj junulinoj, kiuj venis de Jongĝi-gubernio, Ŝanĥi-provinco, kaj la intelektaj junulinoj venintaj de Pekino por fiksloĝiĝi tie, fariĝis intimaj kunuloj en batalo. Ili parolas pri sia profunda kompreno en akcepto de reeduko de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



Marŝado al la Stepo

tra Mil Lioj

—Pri fiksloĝiĝo de kvin pekinaj junuloj en Interna Mongolio

LA Pekin-Baŭtoŭ-a Fervojo etendiĝas de Pekino al la stepo de Interna Mongolio.

Sub la ora sunbrilo, laŭ la fervojo, marŝas grandpaŝe kun levita kapo kvin junuloj, kiuj havas brakinsignon de ruĝa gvardio sur sia brako, tenas la brile ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano, kaj portas bone ligitan pakajon sur la dorso. La junulo kiu marŝas ĉe la fronto, nomiĝas Vang Zuoking, kaj la kvar sekvantaj estas Ŝi Zenggie, Ven Fuhaj, Song Julin kaj Li Ĵonghaj. Tiuj kvin junuloj estis antaŭe lernantoj de la Unua kaj Kvara Mezlernejoj de Tonghian, antaŭurba gubernio de Pekino. En julio pasintjare, responde al la instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ke intelektuloj iru la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ili firme decidis, sub la varma subteno de la lernejoj kaj la familiestroj, piediri al Liangĉen en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, disvolvante la spiriton de Longa Marŝo de 25,000 lioj de la Ĉina Laborista-kamparana Ruĝa Armeo, kiun komandis Prezidanto Maŭ.

LA REVOLUCIA AGADO DE LA JUNAJ STURMANTOJ

Je la tria horo matene, la kvin junaj revoluciaj sturmantoj venis al Tian-anmen-placo, kie lume brilis la lampoj kvazaŭ tage. La kvin junuloj viciĝis sur Ginŝuj-ponto kaj ĵuris solene al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: “Ni estos senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj lia proletara revolucia linio. Maroj iam sekiĝos kaj ŝtonoj iam putriĝos, sed nia ruĝa koro por sekvi strikte Prezidanton Maŭ en revolucio neniam ŝanĝiĝos. Ni ĵuras dediĉi ĉion nian al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj nian junecon al la konstruado de limregionoj de nia patrolando!”

Kian donacon oni portu al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, forlasonte Pekinon por marŝi al la stepo? Ili decidis ĉerpi botelon da akvo el sub Ginŝuj-ponto por ĝin prezenti al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Interna Mongolio kiel la sunlumon kaj roson de Prezidanto Maŭ. La gardostarantaj PLA-anoj ĉe la pordego Tian-anmen helpis ilin plenigi la botelon, manpremis al la junuloj kaj diris: “Ni firme subtenas vian revolucion agadon. Iru al la stepo. Venkon al vi.”

La kvin junuloj ekmarŝis laŭ la revolucia vojo malfermita de Prezidanto Maŭ. Je la 18-a horo de la sekvinta tago, ili atingis Ĉangping, antaŭurba gubernio de Pekino, tramarŝinte 150 liojn. Pro la blovado de la aŭtuna vento kaj longa marŝado krevis al ili la lipoj. Ili palpis la akvobotelon plenan de akvo ĉerpita el sub Ginŝuj-ponto, sed la akvo estas dediĉota al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel donaco kaj ne devas esti trinkita!

Post kvartaga marŝado aperis sur la piedoj vezikoj. Fervojaj laboristoj instruis ilin pri la neceso de lavado de la piedoj per varma akvo por marŝantoj, kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al ili kiel kaj kie ripozu dum marŝado, ktp. Ili kortuŝite diris: “Estas laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj instruis al ni kiel fari la unuan paŝon.”

En la sesa tago ankaŭ la lokomotivistoj de la trajnoj kurantaj sur la fervoja linio rimarkis ilin. La lokomotivistoj trovis ĉiutage ke kvin junuloj marŝas laŭ la fervojo hieraŭ tie kaj hodiaŭ ĉi tie. Io neordinara devas esti en tio. Tiel la lokomotivistoj komencis saluti ilin mane. Kvankam ne eblis interparoli inter ili, tamen la klasa amikeco de proletaro ligis firme iliajn korojn. Kiam la trajno


fluge preterpasis ilin, Vang Zuoking ekdiris: “Kamaradoj, la trajno de la epoko senĉese kuras antaŭen, ni ne devas retroiri eĉ je duonpaŝo.”

“MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ VIN BONVENIGAS”

En la frua mateno de la 3-a septembro, kiam la megafona disaŭdiga stacio de Liangĉen-gubernio disaŭdigis la informon ke “ruĝaj gvardianoj el Tonghian alvenos kaj fiksloĝiĝos en nia Liangĉen de Interna Mongolio”, la tuta urbo de la gubernio ekbolis. En la bonveniga kunveno, la kvin junuloj esprimis al la Liangĉen-a popolo, ke ili nepre prenos la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel siajn instruistojn kaj sintenos kiel iliaj lernantoj. En la vasta mondo de la kamparo, ili kovros sin tra la tuta korpo per koto kaj grasmakuloj, brunigos sian haŭton kaj ruĝigos sian koron, por fariĝi ordinara kamparano kaj servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por la tuta vivo.

Kamaradoj de la aranĝa kabineto diris al ili: “Estas jam decidite ke vi fiksloĝiĝos en brigado ‘Ora Stelo’, kie laboras Guo Laŭhu, landa labor-

modelo!” Aŭdinte tion la junuloj tuj petis iri al sia laborposteno. Ili venis al brigado “Ora Stelo” kaj ricevis varman bonvenigon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kamarado Guo Laŭhu, landa labormodelo kaj membro de la revolucia komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kiu havis la feliĉon esti trifoje akceptita de Prezidanto Maŭ, manpremis al ili ĉiuj kaj diris: “Vi sekvas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj firme iras la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj; ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekstreme vin bonvenigas. Ni nepre agos laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj edukos vin en firmvolajn daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro.” La kvin junuloj respondis: “Ni nepre prenos la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel ekzemplon, estos ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ, montros nin fortaj kiel ‘tigridoj’ en la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj kontribuos niajn fortojn al la revolucio de Ĉinio kaj de la mondo.” En la kriado de “Vivu Prezidanto Maŭ”, Vang Zuoking prezentis donace la akvon el sub Ginŝuj-ponto al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado. “Vivu Pre-



Vang Zuoking kaj aliaj kvar junaj revoluciuloj grandpaŝe marŝas kantante kantojn de vortoj de Prezidanto Maŭ kun plena revolucia entuziasmo.



Vang Zuoking solene donacas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Lianĉeng-gubernio la akvon ĉerpitan ĉe Prezidanto Maŭ — el sub Ginŝuj-ponto antaŭ Tian-anmen-pordego. Guo Laŭhu, landa labormodelo, membro de la Revolucia Komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, akceptas la valoran donacon en la nomo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tuta gubernio.

zidanto Maŭ!” ekkriis Guo Laŭhu kun emocio kaj poste li respekte lokis la neordinaran akvon en la Ekspoziciejon de la Historio de brigado “Ora Stelo”, por ke ĝi estos kune montrata kun la tero alportita el Daĝaj en la jaro 1964. Jen akvo el Pekino kaj tero el Daĝaj, kian profundan signifon ili havas en si! Kun larmo de feliĉo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado diris: “La tero sur monto de Daĝaj kaj la akvo sub Ginŝuj-ponto estas la grundo de la penso de Maŭ Zedong kaj sunlumo kaj roso de Prezidanto Maŭ, kiuj kreskigas la junajn daŭrigantojn kaj garantias ke neniam ŝanĝiĝos la koloro de nia solida ŝtato de la diktaturo de la proletaro!”

Bonaj filoj ne timas malfacilon. Vang Zuoking kaj aliaj petis iri al la produkta grupo kun plej malfacilaj kondiĉoj. Guo Laŭhu do sendis ilin al la 11-a produkta grupo, kiu situas en sufiĉe fora

loko. Sur la vojo ombrita de arboj kondukanta de la brigado al la 11-a produkta grupo, Guo Laŭhu interparolis kun la junuloj ĝoje kaj bonhumore. Li montris al ili kaj diris: “Tie estas niaj Daĝaj-tipaj kampoj kaj jen estas nia pumpa stacio. Post unu monato kaj pli, altensia elektra fadeno estos instalita el la direkto de la maiza kampo...” En la sama tago la junuloj partoprenis la rikoltadon de milio. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la grupo instruis al ili la manipulado de falĉilo. Dum la falĉado, ili interparolis intime. La estro de la Ligo de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj diris: La vojo estas formita de pasantoj. Sed en malsamaj epokoj formiĝas malsamaj vojoj. Kiam ni estis en la aĝo, kian vi nun havas, ni sekvis nian avon al Nordoriento almozetante survoje, ĉar hejme ni trovis nenian eliron sub la ekspluatado de bienu-



En ripozo dum laboro Vang Zuoking kaj aliaj kvar junaj revoluciuloj studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong kune kun la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, por ke la instruoj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ komandu ilin en la batalo.

loj. Sed, ĉiuj korvoj estas same nigraj en la mondo. Ankaŭ tie ne estis elirejo por malriĉuloj. Fine, ruĝiĝas oriento kaj leviĝas la suno. Nun la mondo fariĝis tute luma, kaj vi sekvas strikte la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj iras la vojon de kombiniĝo kun ni laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ. Ĝusta estas via vojo kaj prava estas via ago. Kiel povus esti ke ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ne bonvenigas vin!

Jes, la ruĝaj gvardianoj, kiujn alsendis Prezidanto Maŭ, marŝas antaŭen laŭ la naviglinio malfermita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Komenciĝis al ili batala vivo nova kaj granda!

Ĉe la sojlo de la lumplena jaro 1969, sonadis triumfaj kantoj kaj sinsekve alvenis venkaj informoj sur nia industria fronto. La vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj forte tenas la revolucion kaj intense stimulas la produkton por decide doni pli bonajn laborfruktojn kiel omaĝon al la okazonta Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio.

ŜANHAJO SUKCESIS FABRIKI EKIPAĴON POR SUBTERA MEKANIKAJ PUŜADO DE MEZKALIBRAJ TUBOJ

La unua kompleta ekipaĵo por subtera mekanika puŝado de mezkalibraj tuboj en nia lando, kun monda progresinta teknika nivelo, estas sukcese konstruita post provado en Ŝanhajo. Tio liveras bonajn kondiĉojn por multe, rapide, bone kaj ekonomie disvolvi la urban konstruadon de nia lando.

En la pasinteco, antaŭ ol enmeti subterajn defluajn tubojn, la urbkonstruaj laboristoj devis unue fosi la straton, elpreni teron kaj fari fundamenton. Tiu metodo bezonis multajn materialojn kaj altan laborintensecon, sed ĝia laborefiko estis malgranda kaj cetere multe malhelpis la trafikon. En la jaro 1958, sub la direkto de la ĝenerala linio de socialisma konstruado elmetita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la laboristoj mem elpensis kaj konstruis ekipaĵon por enpuŝi tubojn. Per tiu ekipaĵo tuboj metitaj en elfosaĵo povas esti enpuŝitaj en la teron unu post alia. Tiel, oni povis enterigi tubojn sen detruo de stratoj kaj malkonstruo de domoj. Tamen, la tero interne de la tuboj ankoraŭ devis esti elŝovelita de laboristoj.

En la granda proletara kultura revolucio, la ŝanhajaj urbkonstruaj laboristoj kaj junaj teknikaj laborantoj nur post pli ol trimonata provado sukcesis konstrui kompletan mekanikizitan ekipaĵon por enpuŝi mezkalibrajn tubojn. Per tiu ekipaĵo, ne nur la tero interne de la tuboj estas elfosita per maŝino, sed ankaŭ la laborefiko trioble plialtiĝis.

En la Tagoj de Kombiniĝo kun la Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj

—Pri teknikisto Vang Songŝan

EN septembro, 1964, Vang Songŝan diplomiĝis en kolegio kaj armeaniĝis en alta tajdo de lernado fare de la tutlanda popolo al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Post ne longe li iris en roton kiel soldato por sin hardi.

Antaŭ ol iri en la roton, Vang Songŝan serioze studis koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ kun la problemoj kiel kombiniĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Prezidanto Maŭ instruas nin: “Se la intelektuloj ne kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio. La fina dividlinio inter revoluciaj intelektuloj, nerevoluciaj aŭ kontraŭrevoluciaj intelektuloj estas, ĉu ili volas kaj praktikas kombiniĝon kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj.” Vang Songŝan ekkomprenis, ke tio estas la plej granda espero de Prezidanto Maŭ al la intelektaj junuloj. Li firme decidis agadi laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj firme iri la brilan vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La unua afero, kiun Vang Songŝan renkontis post sia veno al la roto, estis tio, ke gvidanta kamarado donis al li la trezoran libron de revolucio kaj prezentis al li la kreivan studon kaj kreivan aplikon de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la roto; la unua subplotona kunveno, kiun li partoprenis, temis pri studo de la artikolo *Servu al la Popolo*; la unuaj vortoj en la parolado de la subplotonestro estis: “Ni venis el plej diversaj anguloj de nia lando, kaj kolektiĝis kunen por komuna revolucia celo.” La profunda klasfrateco, la batala vivo solidara kaj streĉa kaj precipe la intensa politika atmosfero de kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong fare de la kadroj kaj batalantoj kun senkompare profunda klasa sentimento de la proletaro forte edifis Vang Songŝan. Li diris al la batalantoj: “Mi nepre lernos de la kamaradoj, firme respondos la alvokon de Vicprezidanto Lin kaj nepre posedos

vere la penson de Maŭ Zedong por ĝisfunde remuldi mian mondkoncepton.”

En la roto, Vang Songŝan ĉiam sentis, ke lia penso ofte malakordiĝas kun tiu de la batalantoj. Kial do? Li konsciis, ke kvankam li vivadis de sia infanaĝo kune kun la patrino, kiu laboris pli ol 30 jarojn kiel teksistino, tamen lia mondkoncepto ne estis ĝisfunde remuldata pro la influo de la burĝara eduka linio en la lernejo. Li relernis la instruon de la granda instruanto Prezidanto Maŭ: “Se vi volas esti komprenata de la amaso kaj kunfandiĝi kun ili, vi devas fari decidon trapasi longan kaj eĉ doloran procezon de remuldatao.”

Por pli bone sin hardi, Vang Songŝan aktive prenis la taskon de porkbredado. Foje dum purigo de la porkstalo, la batalanto respondecanta pri porkbredado refaldis siajn pantalonojn, iris en la stalon kun nudaj piedoj kaj komencis balai. Ankaŭ Vang Songŝan iris en la stalon kun nudaj piedoj, sed apenaŭ liaj piedoj tuŝis ĝian fundon kaj surtretis porkfekaĵon, li tuj retiris ilin. Precipe kiam porkfekaĵo ĵetiĝis sur lian korpon kaj vizaĝon, li sentis malagrablacon. Tiam li ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: “Tiam mi eksentis, ke la nere-muldataj intelektuloj estas malpli puraj kompare kun la laboristoj kaj kamparanoj, ke la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ke ili estas pli puraj ol la burĝaraj kaj etburĝaraj intelektuloj kvankam iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekaĵon. Tio ĉi estas la ŝanĝiĝo de la sentoj, de unu klaso al alia.” Vang Songŝan konsciis, ke inter li kaj la batalanto estas diferenco, nome diferenco de sentimento kaj starpunkto. Por malgrandigi tiun diferencan, li nepre devas ŝanĝi siajn pensojn kaj sentojn per fizika laboro. Li do ekprenis balailon kaj eklaboris same kiel la batalanto tretante porkfekaĵon.



Vang Songŝan (dekstre) studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun kamaradoj.

Iun nokton, subite ekblovis forta vento. Vang Songŝan vekigis kaj tuj kuris al la stalo por pririgardi la akuŝontan porkinon. Kiam li alproksimiĝis al la stalo, li trovis, ke la batalanto manĝigas la porkinon per varma manĝaĵo. Tio profunde edifis lin. Ekde tiam, li lernas de la batalanto ĉie kaj en ĉiu afero kaj pene sin remuldas. Foje, du porkidoj malsaniĝis. Li iris 4-5 liojn foren kaj aĉetis tie termometron per sia mono, mezuradis temperaturon de la porkidoj de tempo al tempo, observadis la ŝanĝiĝon de ilia sanstato kaj ilin flegadis neglektante eĉ ripozon kaj manĝon. Tiel agante li sentis, ke lia sento iom post iom proksimiĝis al tiu de la batalantoj, kaj ekhavis komunan lingvon kun la batalantoj koncerne al la fundamenta problemo de servo al la popolo.

Iun nokton, kiam Vang Songŝan kaj iu batalanto estas en deĵoro, subite aŭdiĝis help-krioj — iu falis en laĝeton. Dirinte “helpu!” la batalanto tuj kuris en la direkto al la laĝeto. Ankaŭ Vang Songŝan rapidis post li. Tiam en lia cerbo ekful-

mis penso: nekonata estas la profundeco de la laĝeto, kaj li ne tre bone scipovas naĝi. Se eventuale dum la helpo li... Tiu penso malrapidigis liajn paŝojn. Sed li tuj ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Niaj armeoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.”** Ĉe tio altiĝis lia kuraĝo kaj plimultiĝis lia energio. Li rapidigis sian kuron, la unua ensaltis la laĝeton kaj kune kun la batalanto elsavis la enfalintan virinon.

Vang Songŝan faligis sian egoismon kaj faris bonon por la popolo, sed li sentis, ke li restas ankoraŭ malproksime post la batalantoj. Li diris: “Mi legis pli multe da libroj ol la batalantoj, povas paroli elokvente, sed ofte ne povas interligi teorion kun la realo kaj ofte montras mian malfortecon je ŝlosila momento. Dum savo de la dronanta virino, la batalanto tenas kolektivismon en la unua loko kaj brave rapidis antaŭen; dum mi hezitis kaj ŝanceliĝadis sin ĝenante pro eventualaj gajno

kaj perdo. Jen ĉi tie kuŝas la malforteco de intelektulo.”

Estante tiel rigora al si mem, Vang Songŝan manifestis sian fidelecon al Prezidanto Maŭ en siaj agoj kaj remuldas sian ideologion per sia senĉesa hardado kaj serioza lernado de la batalantoj. Ĉiumatene, li vektoportas per siteloj akvon por la batalantoj, ke ili povu sin lavi; post la vespermanĝo, li kolektas sterkon, kulturigas legomon kaj en dimanĉo li meminciate donas helpon al kuirejo. Post la taga laboro, li persistas studi vespere la “tri popularajn artikolojn”, sin ekzamenas kaj raportas al Prezidanto Maŭ pri sia ideologia remuldo dum la tago. Dum sia duonjara hardado en la roto, Vang Songŝan estis elektita kiel batalanto kun kvin bonoj kaj estis elektita kiel aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Dum sia pli ol duonjara vivo en la roto, Vang Songŝan profunde komprenas, ke intelektulo povas posedi la penson de Maŭ Zedong kaj efektivigi ideologian revoluciigon, nur kiam li firme observas la instruon de Prezidanto Maŭ iri sincere inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, kombiniĝi kun ili, lerni de ili kaj transigi siajn starpunkton, penson kaj senton al la flanko de la proletaro post longa kaj peniga hardado.

Kun firma decido plue kombiniĝi kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, Vang Songŝan revenis al sia antaŭa laborposteno. Li laboris kune kun la laboristoj, same kiel kiam li servis kiel soldato en la roto. Li sintenas kiel humila lernanto de la laboristoj kaj prenas la tutan procezon de laboro kiel tiun de lerno el la laboristoj kaj kombiniĝo kun ili kaj senĉesa remuldo de sia mondkoncepto per la penso de Maŭ Zedong.

En la granda proletara kultura revolucio, strikte sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, Vang Songŝan lanĉis kune kun siaj kamaradoj furiozan ofensivon kontraŭ la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj brave defendis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Li rigardas lernon, plenumon, propagandon kaj defendon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kiel sian noblan devon kaj gloran batalan taskon.

En aprilo de 1967, aktive respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj militpreparon**”, Vang Songŝan iris al iu konstruejo kun

alta batalspirito por partopreni fizikan laboron. Li akceptis la taskon de eksplodigo. Kie estis peza laboro, tie li aperis; kie estis danĝero, tie li batalis. Iutage, li minadis kune kun iu maljuna laboristo. Ili aranĝis kvin minojn, el kiuj eksplodis nur kvar kaj unu ne. La maljuna laboristo diris: “Songŝan, mi iru esplori ĝin.” Tion dirinte li jam estis tuj forironta. Tiam Vang Songŝan pensis: “Estas danĝere malmunti neeksplodintan minon. Ankaŭ antaŭe okazis neeksplodoj kaj ĉiam laboristoj malmuntis.” La nobla spirito de la laboristoj sinofere servi al la kolektivo, sin oferi por aliaj kaj konkure preni sur sin pezajn taskojn edifis kaj stimulis Vang Songŝan. Li diris decideme: “Mi iru!” Tion dirinte li kuris konkure supren kaj sukcese plenumis la taskon malmunti la neeksplodintan minon.

En la lasta tago de partopreno de fizika laboro de Vang Songŝan ankoraŭ restis du eksplodigaj taskoj ne plenumitaj ĉe iu parto de la konstruo. Ili decidis foriri nur post plenumo de ĉiuj tiuj taskoj. Antaŭ la eksplodigo, kiam li estis preparanta dinamiton, li rimarkis, ke kamaradoj alproksimiĝis. Li pensis: Eventuala eksplodo eble endanĝerigos ilian vivon. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**zorgi aliajn pli multe ol sin mem**”, li tuj diris al la kamaradoj en la ĉirkaŭaĵo: “Tenu vin for de mi!” Kiu atendis, ke tiuj kamaradoj apenaŭ foriris dekkelkajn paŝojn, la dinamito eksplodis kun tondra bruo. Aerondoj, ŝtonetoj kaj teroj ĵetiĝis sur Vang Songŝan. Li falis teren. La kamaradoj haste alkuris, lin levis kaj laŭte lin vokis maltrankvile: “Vang Songŝan! Vang Songŝan!” Li nur ekremetis kaj febla voĉo venis el lia buŝo:

“Ĉu aliaj kamaradoj vundiĝis?”

“Ne!”

“Do bone!”

...

Vang Songŝan kviete kuŝis sur lito en hospitalo. Liaj lipoj movetiĝis. Kamarado lin fleganta proksimiĝis sian orelon al lia buŝo kaj aŭdis lian mallalutantan demandon: “Ĉu vi havas kun vi la ‘tri popularajn artikolojn’? Legu por mi la artikolon *Servu al la Popolo*.” Kun varmaj larmoj la fleganta kamarado legis la artikolon. Post la aŭskultado, Vang Songŝan diris per malforta voĉo: “Kiam mi akceptis la taskon de eksplodigo, en mia cerbo ekfulmis timo al eventuala danĝero, sed mi pensis pri la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke **‘ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo’**, kaj mi riproĉis min: Ĉiutage mi studas la artikolon *Servu al la Popolo*, ĉu mi tamen timas

Fariĝi Ordinara Kamparano

ĈEN Ĉangking antaŭe estis studentino de la matematik-mekanika fakultato de la Pekina Universitato. En la jaro 1965, ŝi decideme sekvis la revolucion vojon montritan de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj senŝanceliĝe venis al Tajping-komunumo en Conghua-gubernio de Kantono por tie fiksloĝi kaj akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la lastaj 3 jaroj, ŝi estis elektita kiel aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ sinsekve de la komunumo, gubernio kaj Kantono. Nun ŝi estas elektita kiel vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de la komunumo.

LA UNUA PAŜO BRAVE FARITA

Antaŭ 3 jaroj, kiam Ĉen Ĉangking sin anoncis por iri al la kamparo, levigis inter ŝiaj kunlernantoj, amikoj kaj parencoj diversaj opinioj. Iuj subtenis ŝin iri hardi sin en la tri grandaj revoluciaj movadoj en la kamparo; iuj opiniis ke ŝi jam estas studentino, kaj ke por ŝi iro al la kamparo estas uzo de granda kapablo por malgranda afero; aliaj timis ke ŝia malforta korpo kolapsos sub

peza terkultura laboro; ankoraŭ iuj diris: “La Pekina Universitato estas fame konata lernejo kaj la matematik-mekaniko estas plej moderna fako. Ĉu ankoraŭ necesas timi neakireblon de kontentiga okupo en la estonteco? Kial forlasi la eskalon kondukantan al la ĉielo, sed preferi iron al la kamparo?”

Sed, ĉio ĉi tio ne povis skui ŝian decidon iri al la kamparo.

Ĉen Ĉangking kreskis en la familio de konstrua laboristo. Sub la socialisma sistemo ŝi finis studon en elementa kaj meza lernejoj kaj poste estis akceptita en universitaton. Kun sincera klasa sentimento al la Partio, ŝi decidis dediĉi sian junecon al la Partio kaj la granda socialisma afero. Sed ŝi ankaŭ akre sentis ke ju pli multajn librojn ŝi legas, des pli ŝi malproksimiĝis de la laboranta popolo en sentimento kaj fariĝas senscia pri la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj kreskis ĉe ŝi des pli fortaj burĝaraj ĝuemo kaj vantemo. La burĝaraj profesoroj kaj instruistuloj en la universitato fermis studentojn en klasĉambrojn, por ke ili tuttage dronu inter ciferojn,

morton je la ŝlosila momento? Mi do senhezite prenis sur min la taskon de eksplodigo.”

Sub la zorgado de la Partio kaj dank’ al atenta kuracado de la medicinaj laborantoj, fine la maldekstra okulo de Vang Songŝan denove vidas. Li rigardadis la portreton de Prezidanto Maŭ kaj en lia koro levigis la ruĝa suno, lia arda koro forte batadis kaj liaj feliĉaj larmoj fluis senĉese. Li diris emocie: “Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Estas vi, kiu donis al mi la vidadon! Estas vi, kiu donis al mi la duan vivon! Vi estas la plej kara el miaj karuloj. Ekvidi vian brilan figuron ja estas la plej plej granda feliĉo en mia tuta vivo!” Kun senkompare profunda amo de la proletaro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, tenante penikon per sia ankoraŭ ne tute resaniĝinta dekstra


mano, malgraŭ doloro li nete skribis grandajn ideografiaĵojn: “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!”

En la lastaj jaroj, Vang Songŝan rigardas senliman fidelecon al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong kaj al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kiel la fundamentan direkton de remuldo de sia mondkoncepto; li prenas la brilajn “tri popularajn artikolojn” kiel potencon ideologian armilon por starigi la proletaran mondkoncepton de ekskluziva kaj senrezerva servado al la popolo; li rigardas la kombiniĝon kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiel unikan vojon de efektivigo de ideologia revoluciigo. Li pene marŝas antaŭen laŭ la luma vojo montrita de Prezidanto Maŭ al la revoluciaj intelektaj junuloj!

kaj koruptis la animon de junuloj per pensoj pri titoloj kaj rangoj de "inĝeniero" kaj "specialisto". Ŝi pensis en si: La 12 jaroj en la elementa kaj meza lernejoj jam faris min librovermo nekapa-bla fari fizikan laboron. Se mi restos ankoraŭ 5-6 jarojn en tia universitato, kio mi tiam fariĝos? Mi estas nun 20-jara, troviĝanta ĝuste en la aĝo grava por maturiĝo. Sperti hardadon en klasa kaj produkta bataloj kaj akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havas gravan signifon por formi proletaran mondkoncepton. Ŝi firme tenas la instruon de Prezidanto Maŭ en la memoro: "Kion oni prenu kiel kriterion por juĝi, ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne? Per kio oni lin distingu? La ununura distingilo estas, ĉu li volas aŭ ne volas kaj praktikas aŭ ne praktikas kombiniĝon kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj." Ŝi faris firman decidon iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj venis kun 9 intelektaj junuloj al la montvilaĝo Hiakingjoŭ, kiu situas 30 liojn for de Tajping-komunumo.

ŜVITO DUM FIZIKA LABORO FORLAVIS MALPURAĴON EL LA ANIMO

Tiu tempo ĝuste estis tre okupata sezono por someraj rikoltado kaj plantado. Ili pene laboris kune kun la komunumanoj de frua mateno ĝis nokto, kuris tien kaj reen sur malglataj montvojetoj: supre staras alte montoj, sube troviĝas krutaj profundaĵoj, kaj vektoportado en tia loko estas aparte korporema. En tia malfacila medio, arda entuziasmo de iuj el ili reduktiĝis kaj komenciĝis demoraliza parolo: "Kiaj perspektivoj povas prezentiĝi al ni en tiu montvalo, kie eĉ la ĉielo estas malpli granda ol aliloke?" Ankaŭ Ĉen Ĉangking estis malgaja; antaŭ ŝi ĉio prezentiĝis ne tiel facila kiel en la supozo. En nokto ŝi ne povis endormiĝi, ŝi do ekbruligis petrolan lampon kaj malfermis la ruĝan trezoran libron por relegi la instruojn de Prezidanto Maŭ. Nun la problemo alfrontata estas, ĉu ŝi povas efektive kombiniĝi kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Ŝanceliĝo en renkonto kun malfacilo estas manifestiĝo de kutimoj de etburĝaraj intelektuloj, ĉe kiuj la agoj ne konformas al la paroloj kaj la teorio disiĝas de la praktiko. Tiu, kiu havas nur idealon sed ne la stilon praktiki siajn pensojn per firmaj paŝoj, ne povas revolucii ĝis la fino. Sekve ŝi faris firman decidon sin ĵeti en penigan kaj streĉan laboron por sin hardi kaj ĝisfunde reformi sian malnovan ideologion. Ŝi memvole prenis sur sin pezan laboron. Kiam la komunumanoj asignis malpezan laboron al ŝi pro tio ke ŝia staturo estas



Ĉen Ĉangking

malgranda, ŝi diris: "La vekto ne havas vivon, sed la homo estas viva. La Malsaĝa Avo havis firman volon translokigi du grandajn montojn antaŭ sia domo, kaj mi havas firman volon elhardi al mi ferajn ŝultrojn!" Ŝi neflekseble persistis en tia hardado kaj post unu jaro ŝi ellernis ĉiujn terkulturajn laborojn. Ŝi povas fari kion la aliaj komunumaninoj povas kaj fariĝis unu el la ĉefaj laborfortoj de la produkta grupo.

En hardiĝo per fizika laboro, Ĉen Ĉangking paŝon post paŝo kreskigis al si penson kaj sentimenton de la laboranta popolo kaj laboreman kutimon. Iufoje, kiam ŝi revenis al la brigado post kunveno en la komunumo, estis jam la tria ptm. En tiu vespero ŝi devis ankoraŭ partopreni kunvenon de la brigado, sed ŝi tuj rapidis al sia produkta grupo por transplanti plantidojn kaj poste revenis en mallumo al la brigado por ĉeesti la kunvenon. La sekvintan tagon, kiam la komunumanoj ankoraŭ ne komencis labori, ŝi jam revenis al sia produkta grupo.

Alifoje, kiam Ĉen Ĉangking iris purigi bovstalon, la fermentanta bovfekaĵo eligis blankan vaporon. Ne povante regi sian naŭzon, ŝi fosis iom post iom fekaĵon starante ekster la stalo. Sed la kunlaboranta komunumanino tute senĝene surpaŝis la fekaĵon kaj laboris energie. La komunumanino

diris: “Ne rigardu bovfeĵojn nur kiel ion malpuran, ĝi ja estas trezoro por plantaĵoj.” Ĉen Ĉangking ruĝiĝis kaj ekpensis la instruon de Prezidanto Maŭ: “... la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ili estas pli puraj ol la burĝaraj kaj etburĝaraj intelektuloj, kvankam iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfeĵojn.” Por malpureco kaj pureco, malnobleco kaj nobleco, malsamaj klasoj havas malsamajn kriteriojn. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rigardas feĵojn kaj rubaĵojn kiel trezoron, sed la parazitaj de ekspluataj klasoj preterpasas ilin ŝtopante la nazon. Ĉen Ĉangking trovis, ke en la profundo de sia animo latentas ankoraŭ malbela penso de ekspluataj klasoj. Timi malpurecon estas esence timi fizikan laboron kaj revolucion. Poste ŝi aktive okupiĝis pri sterkado kaj porkobredado k. s. laboroj kaj prenas tiujn kiel gravan batalon kontraŭ siaj burĝaraj pensoj. Ŝi decidis purigi sian animon per ŝvito verŝata dum fizika laboro.

La brigado iam intencis postenigi ŝin en lernejon kiel instruistino. Ŝi petis: “Tio, sur kion oni apogas sin por instrui, estas la penso de Maŭ Zedong, sed ne tio, kiom da libraj scioj oni posedas. Mi studis en lernejoj pli ol dek jarojn kaj en mia kapo troviĝas nemalmultaj malnovaj pensoj. Por reformi mian mondkoncepton mi bezonas longdaŭran partoprenon en fizika laboro, prefere do lasu min resti ĉi tie!”

En longdaŭra fizika laboro, ŝi starigis profundan klasan amikecon kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ŝi sentas ke ili estas ŝiaj plej intimaj kunuloj, kaj ankaŭ la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la tuta vilaĝo ŝin ŝatas elkore.

MATURIĜO EN GRANDAJ ŜTORMOJ DE KLASA Batalo

En la kuna laborado kaj vivado kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Ĉen Ĉangking spertis la hardadon de klasa batalo kaj senĉese leviĝis ŝia konscio pri klasa kaj linia bataloj. En la pasinteco ŝi vidis la ekspluaton kaj subpremon suferitan de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la malnova socio nur el la filmo *Blankhara Knabino* kaj argila statuaro *Rentkolekta Korto*. Sed nun, antaŭ ŝi ja estas intimuloj, kiuj suferis antaŭ la Liberiĝo kruelan ekspluaton de bienuloj kaj nun fariĝis mastroj de la nova socio. Antaŭ la Liberiĝo, en tiu ĉi vilaĝo estis dek unu familioj, el kiuj iuj almozpetis, aliaj estis jardungitoj suferintaj sub vipo, sep virinoj estis venditaj kiel servistinoj aŭ infaned-

zinoj. La malriĉkamparana komunumanino Liang Nju rakontis al ŝi sian mizeran pasintecon kun larmoj. En sia infanaĝo ŝi perdis siajn gepatrojn kaj estis plurfoje venditaj. Kruelaj bienuloj batis ŝin ĝis duonmorto. La rakontaĵo ardigis Ĉen Ĉangking per indigno, ŝi verŝis siajn larmojn kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ŝia koro ligiĝis kun la iliaj. Iom post iom ŝi ekkomprenis, kial la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj senlime amas Prezidanton Maŭ kaj firme iras la socialisman vojon. Ĉar ili abunde suferis ekspluaton kaj subpremon en la malnova socio. Sed ŝi mem kreskis en dolĉa vivo, tial mankas al ŝi ilia starpunkto kaj klasa sentimento klare pri amo kaj malamo. Ŝi profunde ekkonis ke pura vero estas la instruo de Vicprezidanto Lin: “Kiu ne komprenas, kio estas klaso, kaj kio estas ekspluato, tiu ne povas kompreni revolucion.” Voli aŭ ne voli akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj koncernas la tre gravan demandon, ĉu oni povas revolucii ĝis la fino aŭ ne. Sekve ŝi aktive informiĝis pri familiaj kaj vilaĝaj historioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, prenas rememoradojn de la pasinta amaro en komparo kun la nuna dolĉo kiel nepran lecionon por studi klasan batalon kaj reformi sian mondkoncepton. Ŝi profunde ekkomprenis ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas la plej bonaj instruistoj por ŝin reeduki.

En la tri jaroj de post ŝia fiksloĝiĝo en la vilaĝo, ŝi propraokule vidis diversajn krimajn intrigojn de plenmano da klasaj malamikoj en subfoso de la popola komunumo kaj provado de restaŭro de kapitalismo, kaj persone partoprenis la intensan batalon faritan de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kontraŭ klasaj malamikoj. Dum batala kunveno, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiam petis ŝin funkcii kiel protokolisto, maljunaj malriĉkamparanoj ĉiufoje admonis ŝin: “Notu ĉiujn frazojn senpreterlase.” La plumo gravuris la faktojn de sanga klasbatalo kaj notis akuzojn plenajn de sango kaj larmoj kaj ĝisostan malamon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kontraŭ malamikoj. En la intensa klasbatalo, ŝi akiris pli profundan komprenon pri la granda instruo de Prezidanto Maŭ “**Nepre ne forgesu la klasan batalon**”.

“Ĉio kreskas dank’ al la suno, kaj plantoj kreskas dank’ al la pluvo kaj roso”, la juna Ĉen Ĉangking sane kreskas kaj maturiĝas sub la nutrado de sunbrilo de la penso de Maŭ Zedong.



Intelektaj gejunuloj skribas decidon por montri sian fidelecon al Prezidanto Maŭ, ke ili ĉiam kombiniĝos kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ĉiam daŭrigos la revolucion.

Akcepti Reedukon de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

Sub la kuraĝigo de la batala alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la vasta intelekta junularo de Pekino konkure iras al la kamparo por tie fiksloĝiĝi kaj ricevi reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ĵuras hardi sin en daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de diversaj lokoj en la kamparo entuziasme bonvenigas la intelektajn gejunulojn, kiuj alvenas tien por fiksloĝiĝi. Ili ne nur antaŭpreparas loĝejojn kaj vivbezonaĵojn por la intelektaj gejunuloj, sed ankaŭ prizorgas ilian maturiĝon en politiko. Kiam intelektaj gejunuloj ĵus alvenas, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kun profunda proletara sentimento donacas al ili insignojn kun portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ruĝan trezoran libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Ili intime admonas ilin studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn instruojn, iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj fariĝi liaj bonaj junuloj.





La revoluciaj avo kaj patrino ĝoje forsendas sian knabon al la kamparo por tie fiksloĝiĝi kaj ĉiam esti bona posteulo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



Onklino malriĉkamparanino intime parolas kun la intelekta junulino.

Ili kune iras al laboro.



Ili transdonacas al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj mangon, kiun Prezidanto Maŭ donacis al Ĉefurbaj Laboristaj Propagandaj Taĉmentoj de la Penso de Maŭ Zedong.



Por ke revoluciaj gejunuloj ĉiam tenu en sia memoro la damnindan krimon de kruela ekspluato kaj subpremo fare de bienuloj kaj kapitalistoj kontraŭ la laboranta popolo.



Gejunuloj aŭskultas la maljunan malriĉkampaŝon paroli pri flegado de fruktarbo.

Grava dokumento nove eldonita

**Komuniko de la
Plivastigita Dekdua
Plena Sesio de la
Oka Centra Komitato
de la Komunista
Partio de Ĉinio**

Aprobata je la 31-a de oktobro 1968
(Esperanta eldono)

Eldonita ankaŭ en la lingvoj araba, bengala, birma, angla, franca, germana, haŭsa, hindia, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, persa, portugala, rusa, serba, hispana, ŝahilia, tamila, taja, turka, urdua kaj vjetnama.

En poŝformato de 9 x 12.7 cm.

Eldonis: **Fremdlingva Eldonejo**, Pekino, Ĉinio

Distribuas: **Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)**, Pekino, Ĉinio

Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta
Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio.

Epizodoj en la Alta Tajdo de Iro de Intelektaj Junuloj al la Kamparo

BENLIU

POST kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la batalan alvokon, ke la intelektaj junuloj devas iri al la kamparo, aperis multaj kortuŝaj epizodoj, en kiuj grandnombraj kadroj fervore sendis siajn gefilojn al la kamparo kaj la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj varme bonvenigis la alvenantajn intelektajn junulojn.


LETERO DE MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ

Varme respondante al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ ke “la intelektaj junuloj iru al la

kamparo kaj ricevu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj”, la diplomitoj de la 13-a Mezlernejo de la urbo Benhi, Liaŭning-provinco, iris unuj post aliaj al la kamparo por fiksloĝi tie. Sed, nur Ji Lili ankoraŭ restis hejme pro iu kaŭzo. Iutage ŝi subite ricevis el iu vilaĝo leteron, kiu estis kolektive subskribita. La letero estis nelonga sed plena de ardeco. Estis kune alsenditaj tri trezoraĵoj: ore brilanta insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ, ruĝa libreto, nome la “ kvin popularaj artikoloj ” de Prezidanto Maŭ, kaj saketo da greno.

Je la diplomiĝo Ji Lili la unua deklaris sin preta fiksloĝi en iu fora produkta grupo. Kaj tio estis

Komunumanoj sur stepo de Interna Mongolio varme bonvenigas intelektajn junulojn kiuj venos fiksloĝi. La komunumanoj atente ornamas novajn tendojn por la baldaŭ venontaj intelektaj junuloj.





Komunumanoj de Ŝilingola Ligo de Interna Mongolio entuziasme bonvenigas intelektajn junulojn de Pekino.

ankaŭ bonvena al la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de tiu produkta grupo. Tamen, ili trovis ke Ji Lili ankoraŭ ne atingis, tial ili kolektive skribis al ŝi, varme esperante ke ŝi rapide venu al ili. Ili sendis al ŝi la insignon kun la portreto de Prezidanto Maŭ, esperante ke la ruĝa koro de Ji Lili sin direktu al la suno por ĉiam sekvi Prezidanton Maŭ fari revolucion; ili sendis al ŝi la “kvin popularajn artikolojn”, esperante ke ŝi legu verkojn de Prezidanto Maŭ kaj aŭskultu liajn vortojn; kaj ili sendis al ŝi grenon, esperante ke ŝi hardu sin kaj kresku en la vasta mondo de kamparo.

La vortoj de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj donis profundan lecionon al Ji Lili. Ŝi diris: “Karaj estas la gepatroj, sed ne tiom, kiom Prezidanto Maŭ; profundaj estas riveroj kaj maroj, sed ne tiom, kiom la klasa amo. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj estas miaj plej proksimaj parencoj. Ilia espero metita sur min estas plej granda stimulo al mi. Mi nepre aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj fiksloĝiĝos en la kamparo.”

Ji Lili fiere ekiris al la vasta mondo de kamparo, kun ore brilanta insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ sur la brusto kaj trezora libreto en la sino.

KORA DEZIRO DE AVINO MALRIĈKAMPARANINO

Avino Ĉu Ŝuĝen, malriĉkampanino de Ljuhua-produkta grupo de Donghin-brigado de Huangloŭ-komunumo, Ĉuanŝa-gubernio, Ŝanhajo, tre ĝojis, aŭdinte ke aro da urbaj intelektaj junuloj venos al la grupo por fiksloĝiĝi, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ pri iro al la kamparo kaj montregiono. Ŝi diris: “Tio estas senprecedenca afero, ke urbaj intelektaj junuloj venas al vilaĝoj por fariĝi kamparanoj. Ili venas ja laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj mi devas nepre trakti ilin kiel miajn proprajn infanojn.”

En la komenco, la kadroj de la grupo ne intencis loĝigi la alvenontajn junulojn en ŝia domo, konsiderante ke ŝia loĝejo estas ne vasta. Ŝi tre maltrankviliĝis aŭdinte tion. Ŝi pensis ke, se ŝi ne akceptos en sian domon intelektajn junulojn, tio signifas ke ŝi ne plenumas sian devon kaj vanigas la esperon de Prezidanto Maŭ al la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ŝi do interkonsiliĝis kun la najbaro kaj sukcesis aranĝi, ke la komune uzata ĉambro povas esti vakigita, por ke kelkaj alvenontaj junuloj nepre loĝu ĉe ŝi. Ne longe poste, la kora deziro de avino Ĉu Ŝuĝen realiĝis: la urbaj



毛主席最新指示

知识青年到农村去，接受贫下中农的再教育，很有必要。要说服城市干部、青年和知识人，把自己初中、高中、大学毕业的子女，送到农村去一个动员。各地农村的同志要主动接待他们去。



En familia studrondo de la penso de Maŭ Zedong, Liü Venki, membro de la urba revolucia komitato de Liaŭjuan, kuraĝigas sian filinon Liŭ Fengan, kiu baldaŭ iros al fronto de agrikultura produkto por firme iri la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, enradiĝi, flori kaj frukti en la kamparo.

junuloj fiksloĝigontaj en la kamparo venis al la grupo. Posttagmeze de tiu tago, ŝi iris al la brigado kune kun la kadroj kaj junuloj de la produkta grupo, spite al la malfacileco en piedirado kaŭze de sia aĝo, por bonvenigi la intelektajn junulojn kaj konduki ilin al sia domo. Ŝi diris: “Mi petos ilin instrui al mi vortojn de Prezidanto Maŭ, kaj mi edukos ilin per la klasbatalo en la kamparo kaj instruos al ili produktajn teknikojn, por ke ili vere fariĝu daŭrigantoj de la revolucia afero.”

“FARIĜU BONA POSTEULO DE MALRIĈ-KAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ”

Iutage venis al Cunĵuj-a Mezlernejo en Ŝanhajo maljuna kadro de iu trupo de PLA kaj insiste petis la revolucionan komitaton de la lernejo asigni al lia filino postenon en limregiono, en la loko, kie la kondiĉoj estas plej malfacilaj. Tiu kamarado estis Ĝang Hĵueŝeng, la patro de lernantino Ĝang Huali, kiu finis la studon en la supera mezlernejo en 1967.

En la komenco, la patrino de Ĝang Huali ne estis volonte preta lasi sian filinon iri al malprok-

sima limregiono, kaj ankaŭ la filino esperis trovi okupon en Ŝanhajo. Ĝang Hĵueŝeng tuj ekkonsciis ke tio estas respegulo de malnovaj pensoj kaj malnovaj ideoj de ekspluataj klasoj ĉe ili. Li pensis en si: mi estas revolucia kadro kaj kompartiano kaj havas la devon ilin helpi. Do li fondis studrondon de la penso de Maŭ Zedong en la hejmo, en kiu li rakontis al ili la suferplenan pasintecon de la familio kaj edukis ilin per rememoro pri la pasinta amaro en komparo kun la nuna dolĉo. Lia edzino diris kun kortuŝiĝo: “Ankaŭ mi estis malriĉa infano havanta profundan malamon kontraŭ la klasa malamiko kaj suferinta grandan mizeron en la malnova socio. Post la alveno al la urbo, pro longtempa forlaso de fizika laboro, iom post iom ŝanĝiĝis miaj penso kaj sentimento. Mi forgesis efektive mian devenon. Nun mi ekkomprenas ke, kiam la infano iros al la kamparo aŭ montregiono, ĝi multe pli proksimiĝos al Prezidanto Maŭ, kvankam malproksime forlasinte sian patrinon. Mi decideme subtenas Huali iri al limregiono!”

Sub la eduko kaj helpo de la gepatroj, ankaŭ Ĝang Huali ekkonsciis, ke ami restadon en la gran-

Studento Bonvena al Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

Kamarado Gu Ĉenghiang de Luĝuang-grupo de Gengĉe-komunumo, Sukian-gubernio, Giangsu-provinco, estas studento bonvena al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

En 1964, Gu Ĉenghiang finis sian studon en kolegio kaj revenis al la kamparo. Antaŭ sia reveno al la kamparo, li ripetade studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “. . . nun nia lando estas tre malriĉa kaj ne estas eble radikale ŝanĝi tiun ĉi staton dum mallonga tempo, kaj prospera kaj potenca lando povos esti kreita nur en daŭro de kelkaj jardekoj per solidareca luktado per la propraj manoj de nia juna generacio kaj la tuta popolo.” Li pensis en si: Estas ŝuldita al la kulturado de la Partio kaj popolo, ke mi fariĝis studento, kaj mi ne devas forgesi mian devenon post la fino de kolegia studo, nek apartiĝi de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj mi devas konstrui novan socialisman kamparon kune kun ili.

En la unua tago de sia alveno al la Luĝuang-grupo, Gu Ĉenghiang tuj demetis sian studentan kostumon kaj nudpiede laboris kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li prenis

malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel siajn instruistojn kaj ĉie lernis de ili kaj faris la plej pezajn kaj malpurajn laborojn. Kiam la ĵus plantitaj batatoj estis inunditaj de pluvakvo, li drenis la akvon malgraŭ la forta pluvo kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili batalis kontraŭ la inundo en tago kaj nokto, kaj sukcesis protekti la batatojn. En tagoj de serioza sekeco, li disvolvis la revolucion spiriton de kontinua batalado kaj vektorportis akvon por savi plantaĵojn. Por sukcesigi la kolektivan produkton, li forgesas lacon kaj laboras ĉiutage de tagiĝo ĝis vespero.

Vespere, Gu Ĉenghiang studas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, intime interparolas kun ili kaj akceptas ilian reedukon. Plie, utiligante liberan tempon, li vizitas malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn unu post alia por peti ilin rakonti al si la historiojn de familioj, de la vilaĝo kaj de la batalo inter la du linioj. El sia vizitado, Gu Ĉenghiang vidis, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havas senkomparan malamon kontraŭ la nigra varo de “tri pliigoj kaj unu fikso” distrumpetita de Liu

da urbo kaj ne voli vivi en loko kun malfacilaj kondiĉoj estas komenco de reviziistiĝo. Ŝi esprimis firme, ke ŝi ĉiam memoros la instruon de Prezidanto Maŭ, ke “la kamparo estas vasta mondo, kie oni povas multon fari”, kaj iros al la kamparo, al limregiono, por kombiniĝi kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sin hardi kaj elforĝi ruĝan koron senlime fidelan al Prezidanto Maŭ.

La peto de Ĝang Huali pri iro al Hejlonggiang estis konsentita de la lernejo. La tuta familio estis tre ĝoja. Ĉe la adiaŭo, la patro donacis al sia filino kompletan da *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj diris admone: “Mia infano, estu ĉiam fidela al Prezidanto Maŭ, iru dum la tuta vivo la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj, ĉiam enradikiĝu en la kamparo kaj fariĝu bona posteulo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.”

Ŝaŭki kaj detruanta la kolektivan ekonomion, sed, ekparolante pri la irado de la socialisma vojo kaj ŝanĝiĝo de la malriĉa fizionomio de sia grupo, ili tuj entuziasmiĝis. Sub ilia helpo, la konscio de Gu Ĉenĝiang pri bataloj inter klasoj kaj inter linioj estas altigita.

Gu Ĉenĝiang bone laboris en la kamparo kaj estis bonvena al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili elektis lin estro de la produkta grupo. Li diris al ili: "Vi fidas min, mi nepre bone servos al vi kaj konstruos novan socialisman kamparon kune kun vi. Mi nepre klopodos por maturiĝi kune kun la nova socialisma kamparo."

Foje, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al li, ke kelkaj komunumanoj influitaj de la kapitalisma mastruma penso distrumpetita de Liu Ŝaŭki ne partoprenas kolektivan produkton, sed teksas ŝtofon hejme por negoci. Kiel oni povas frakasi ĉi tiun spontanegan forton de kapitalismo? La granda penso de Maŭ Zedong ja estas la plej potenca armilo. Tial, kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Gu Ĉenĝiang mobilizis la kadrojn kaj komunumanojn levi altan tajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj samtempe kune kun ili li rememoris la amarajn pasintaĵojn en la malnova socio en komparo kun la nuna feliĉa vivo, laŭdis la superecojn de kolektiviga vojo kaj plene malkovris la damnindan krimon de la "tri

pliigoj kaj unu fikso". La konscio de la komunumanoj pri la bataloj inter klasoj kaj inter linioj altiĝis, kaj ili malkaŝis unu klasan malamikon, kiu subfosis la kolektivan produkton. Tra la batalado kontraŭ la malamiko, la komunumanoj akriĝis sian vidon, altigis sian konscion kaj korektis antaŭajn erarajn pensojn. Tio ankaŭ donis al Gu Ĉenĝiang profundan edukon. Ekde tiam, la komunumanoj de la tuta grupo unuiĝis kiel multopigita ŝnuro kaj senĉese aperis ĉe ili bonaj homoj kaj bonaj aferoj elmontrantaj varman amon al la kolektivo. En la kolektiva produkto aperis intensa vicleco kaj prospero.

Por rapide ŝanĝi la postrestintecon de la grupo, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ "lerni de Daĝaj en agrikulturo", Gu Ĉenĝiang organizis la komunumanojn lerni el la heroaĵoj de la Daĝaj-aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj luktis kontraŭ la naturo, por iri la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj. Plene disvolvante sian energion, la komunumanoj konstruis mekanikan puton profundan je pli ol 40 m. en kvin tagoj. Tiu puto ludis grandan rolon en la batalo kontraŭ sekeco. Sub la helpo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj li venkis printempan froston, sukcese faris varmbedojn por plantidoj de batatoj kaj kulturis multajn printempajn batatplantidojn. Apogante sin sur siaj propraj fortoj, la grupo solvis la problemon de plantado de printempaj batatoj, tiel ke la produktkvanto de nutraĵo multe kreskis kaj rompita la plej altan rekordon en la historio de la grupo.

Agi laŭ la Penso de Maŭ Zedong

EN la granda proletara kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong ricevis senprecedencan popularigon inter la sepcent milionoj da ĉinaj popoloj. Kvazaŭ la sunbriloj kaj pluveroj la penso de Maŭ Zedong nutradas la koron de la vastaj revoluciaj popolamasoj, kaj sur la vasta tero de nia granda

socialisma patrolando, amase aperadas ĉiutage kortuŝaj ekzemploj pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong.

REDONO DE SUPERPAGO

Kvankam jam forpasis pluraj monatoj, tamen inter la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj

malsuperaj mezkampanoj de Hiĝuang-brigado ankoraŭ cirkuladas la rakonto pri la redono de superpago por muelmaŝino fare de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hipu-brigado, Gianming-komunumo, Zunhua-gubernio, Hebej-provinco.

Jen kiel tio okazis: Hipu-brigado havis superfluan malnovan muelmaŝinon, kaj ĝin forĉetis Hiĝuang-brigado per 300 juanoj. Apenaŭ la kamarado de Hiĝuang-brigado forlasis Hipu-brigadon plenuminte la aĉetan taskon, inter la komunumanoj de la lasta brigado tuj leviĝis disputado pri la prezo:

“La muelmaŝino estis aĉetita nur per iom pli ol 400 juanoj kaj estis uzata dum 7-8 jaroj. Kvan-kam dume oni devis pagi por kelkaj akcesoraj partoj, tamen ĝi ja ne devas esti vendita por 300 juanoj.”

“Aĉeti volonte kaj vendi volonte — jen la ‘malnova konvencio’ delonge observata en komerco.”

Poste, pri tio informiĝis kamarado Vang Guofan, respondeculo de la gvidanta personaro de la brigado, kaj li tuj kunvokis la gvidantan personaron por diskuti pri tio. Unue, Vang Guofan gvidis ilin studi la brilajn artikolojn *Servu al la Popolo* kaj *Memore al Norman Bethune*. Li diris al ili poste: “Tenante la potencon por la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, ni devas observi la instruojn de Prezidanto Maŭ en ĉiuj aferoj kaj ĉie enkorpiĝi la novan penson kaj novan stilon de la proletaro.” La ĉeestantoj ĉiuj konsentis lian opinion kaj decidis unuanime redukti la prezon laŭ ĝia uziteco plus la pago por la aldonitaj maŝinpartoj kaj redoni al Hiĝuan-brigado 124 juanojn el la pago por la muelmaŝino.

Post la kunveno, la gvidantaro de la brigado skribis pardonpetan leteron kun memkritiko kaj komisiis du kadrojn porti ĝin kune kun la elkora sento de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hipu al Hiĝuang-brigado 30 kilometrojn malproksima. Informiĝinte pri ilia celo, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la lasta tre kortuŝiĝis kaj rifuzis akcepti la redonitan monon.

La varmkoreco de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hiĝuang-brigado tre embarasis Vej Ĉangŝun, kiu alportis la monon. Li pensis: miloj kaj dekmiloj da niaj vortoj ja ne povas egalvalori unu vorton de Prezidanto Maŭ.

Li elpoŝigis sian ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj laŭtleĝis: “Nia devo estas respondeci al la popolo. Ĉiu vorto, ĉiu ago, ĉiu politiko devas konformi al la intereso de la popolo, kaj se estas farita iu eraro, ĝi devas esti nepre korektita — jen kion signifas respondeci al la popolo.” Poste li diris emocie: “Kamaradoj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hiĝuang, malalta estis nia politika konscio kiam ni vendis la muelmaŝinon, tial ni agis malbone. Poste altiĝis nia konscio dank’ al studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kaj hodiaŭ ni venis al vi por peti vian pardonon ĝuste laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.” Tion dirinte, li donis ambaŭmane la pardonpetan leteron kaj la monon al la alia flanko. Tiam la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hiĝuang-brigado emociitaj ĝis larmoj diris: “Vi alsendis al ni ne sumon da mono, sed imitindan ekzemplon en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong kaj profundegan amon de klasaj fratoj!”

LA “TRI POPULARAJ ARTIKOLOJ” LUMIGIS ŜIAN KORON

Post longa veturado de miloj da lioj, Liu Fenglian venis al la altebenejo de Kinghaj por vidi sian edzon Gaŭ Ĝaŭnan. Kiam ŝi atingis la roton, ŝi tuj rimarkis, ke Gaŭ Ĝaŭnan en bluzo vektoportas sitelojn da manĝaĵo por manĝigi porkojn. Ŝi tuj divenis, ke li estas bredisto, kaj sentis iom da malagrableco.

Tiuvespere, Liu Fenglian diris al sia edzo: “Gaŭĉjo, vi servis en la armeo jam 7-8 jarojn, tamen ankoraŭ restas bredisto. Nenian teknikon vi ellernis, do per kio vi servos al la popolo post via militservo?” Aŭdinte ŝiajn vortojn, Gaŭ Ĝaŭnan pensis, ke ŝi ankoraŭ ne en ĉiuj aferoj kreive studas kaj kreive aplikas la “tri popularajn artikolojn”, kaj ne alta estas ŝia konscio pri la batalo inter la du linioj. Li decidis nepre helpi ŝin en altigado de la konscio pri la batalo inter la du linioj. Gaŭ Ĝaŭnan elprenis la “tri popularajn artikolojn” kaj diris al ŝi: “Pli alta estas via klereco, do voĉlegu por mi la ‘tri popularajn artikolojn’!” Liu Fenglian transprenis la ruĝe brilantan revolucionan trezoran libron kaj baldaŭ jam tralegis la artikolojn. Tiam Gaŭ Ĝaŭnan ŝin demandis tuj sekve: “Ĝang Side preparis lignokarbon en la revolucia vicaro, respondu, ĉu oni ne povas diri, ke li servis al la popolo?” Liu Fenglian respondis klare: “Ĝang Side estas brila ekzemplo pri ‘ekskluziva’ kaj ‘senrezerva’ servado al la popolo!” Kaj Gaŭ

Ĝaŭnan ŝin demandis denove: “Ĉu do bredado de porkoj povas esti rigardata kiel servado al la popolo?” Aŭdinte tiun demandon de la edzo, Liu Fenglian respondis mallaŭte kun iom da honto: “Ankaŭ porkbredado estas servado al la popolo. Mi tamen pensis, ke ellerninte ian teknikon oni povas fari pli grandan kontribuon al la popolo.” Celante tiun ŝian vivan penson, Gaŭ Ĝaŭnan voĉlegis jenan instruon de Prezidanto Maŭ en la artikolo *Memore al Norman Bethune*: **Ĉiu homo povas havi grandan aŭ malgrandan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla, pura, bonvirta, libera de trivialaj interesoj kaj utila al la popolo.**” Kaj li diris al ŝi poste: “En servado al la popolo, oni ne devas dependi de tekniko, sed de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, de sia ruĝa koro fidela al Prezidanto Maŭ. La pura teknika vidpunkto estas produkto sub la influo de la venena tezo ‘tekniko sur la unua loko’ porpledita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. Ni devas nepre ne esti trompita de li, sed servadi tutkore kaj tutanime al la popolo sub la gvidado de Prezidanto Maŭ.” El la vortoj de sia edzo Liu Fenglian ricevis grandan helpon en altigo de sia konscio, kaj ŝi diris: “Nun mi jam komprenas, ke oni povas vere servi al la popolo, nur se oni agadas laŭ la ‘tri popularaj artikoloj.’”

Ekde tiam, Liu Fenglian studas la “tri popularajn artikolojn” kaj bredas porkojn kune kun kamarado Gaŭ. Iutage, Gaŭ Ĝaŭnan malŝanĝis, kaj la militista intendanto intencis asigni alian kamaradon zorgi pri la porkoj. Informiĝinte pri tio, Liu Fenglian diris al la intendanto: “Ne asignu alian! Vi konfidu la porkbredan laboron al mi!” La intendanto diris: “Vi venis al la roto por vidi vian karulon, do vi devas bone ripozi.” Sed Liu Fenglian diris firmdecide: “Kamarado Bethune estis fremdulo kaj li ne trovis la vojaĝon longa por veni al Ĉinio fore de miloj da mejloj por helpi Ĉinion en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito. Ni devas lerni de kamarado Bethune.” Tion dirinte, ŝi jam iris konkure por breddi la porkojn. Kamaradoj de la roto ĉiuj laŭdis ŝin dirante: “La ‘tri popularaj artikoloj’ lumigis ŝian koron.”

LA RUĜA KORO ĈIAM INKLINAS AL PREZIDANTO MAŬ

Ĉiam pli dense falis la neĝo. Pli ol 60-jara malriĉkamparano Vang Hjuehin de Daĝangĝuangbrigado de Mohe-komunumo, Tanĉeng-gubernio, Ŝandong-provinco, tiam estis manĝanta en sia domo. Li subite ekmemoris ion, formetis la

bovlon kaj forrapidis grandpaŝe. Lia maljuna edzino tuj postkuris lin kun juta sakego, intencante lin kovri per ĝi kaj lin ŝirmi de la neĝblovo, sed maljuna Vang jam malaperis en la malproksimo. Deskuante la neĝon sur siaj piedoj, onklino Vang grumblis: “Jen la maljunulo eĉ ne diris al mi, pro kio urĝa li forrapidis.”

Por kompreni la okazaĵon, oni sciis, ke multe altiĝis la politika konscio de onklo Vang dank’ al studado de verkoj de Prezidanto Maŭ en la studrondo de la penso de Maŭ Zedong de la brigado. Lastatempe, por pene klopodi por la kolektivo, li frue ellitiĝas ĉiumatene kaj enlitiĝas malfrue en la nokto. Antaŭtagmeze de tiu tago, kun sterkokolekta korbo sur la ŝultro li kontrolis la bovstalon kaj kelon por kukurboj kaj trovis, ke oni ne kovris la aperturon de la kelo pro releviĝo de la temperaturo. Sed neatendite ŝanĝiĝis la vetero post la tagmezo kaj ekfuriozis neĝblovado. Ekmemorinte ke la aperturo de la kelo ne estas kovrita, li tuj alportis pajlojn, ĝin plene ŝtopis, kaj revenis hejmen nur post tio.

Apenaŭ li enpaŝis la pordon de sia domo, onklino Vang jam diris rekte al li malbonhumore: “Kun tiel granda aĝo kaj ne estante kadro nek povante ricevi laborpoentojn pro tio, vi tamen senĉese sin okupadas en tia frosta tago. Kia bravulo vi vin montras!” Tion aŭdinte, onklo Vang diris nenion, kaj kunvokis, post la vespermanĝo, familian kunvenon por kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon. Unue li diris al sia filo, ke li voĉlegu vortojn de Prezidanto Maŭ, kiaj **“kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon”, “servi al la popolo tutkore kaj tutanime”**. Kaj li diris tuj sekve: “Prezidanto Maŭ instruas nin, ke ni batalu kontraŭ egoismo kaj kritiku reviziismon, kaj faru ĉion por la intereso de la kolektivo. Pripensu, ĉu viaj ĵus diritaj vortoj konformas al la instruo de Prezidanto Maŭ? Ja ĉiu devas zorgi pri la kolektivo kaj ĉiu havas sian devon en la socialisma konstruado. Ĉu nur la kadroj povas fari ĉion? Kaj cetere, labori por akiri laborpoentojn ja estas nigra varo de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Ni ja ne devas lasi nin esti trompitaj de li! Se ĉiuj sintenus same kiel vi, en kiu tago do povos esti konstruita socialismo?...”

La vortoj de onklo Vang forte tuŝis la koron de lia maljuna edzino, kaj tiu ĉi diris: “Miaj ĵusaj vortoj estis diritaj en malbona humoro kaj ili entenis egoismon, ili estas malpravaj kaj mi nepre korektos mian eraron; en la estonteco, se vi trovos ion farendan por la kolektivo, diru al mi, ke ankaŭ mi ĝin faru vin helpante!”

Ekfunkcias la Hidraŭlika Elektrejo de Fuĉun-rivero

Sur la pitoreska Fuĉun-rivero, estas konstruita kaj funkciigata nova hidraŭlika elektrejo, kiun la laborista klaso de nia lando mem projektis, konstruis kaj muntis. Tio estas alia triumfa kanto en firma plenumo de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ fare de nia laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong; tio estas omaĝo de la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj, kiuj konstruis la elektrejon, al la okazonta Naŭa Kongreso de la granda, glora kaj korekta Komunista Partio de Ĉinio.

La nomita elektra stacio estas de granda tipo. Ĝi provizos Ŝanhajon, Nankinon kaj la urbojn kaj vilaĝojn de la Hangghahu-ebenejo en Ĝegiang per potenca elektra energio kaj ludos tre grandan rolon en disvolvo de industria kaj agrikultura produktoj en tiuj lokoj.

La procezo de la konstruado de tiu elektra stacio spertis intensan batalon inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

En la jarfino de 1965, kiam estis baldaŭ komentota la konstruado de la Hidraŭlika Elektrejo de Fuĉun-rivero, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la konstruejo urĝeme elsaltis kaj energie antaŭenpuŝis la reviziisman linion de la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. Kune kun burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj", ili ellaboris en kabineto projekton de konstruo. Laŭ ilia projekto kaj plano, ne nur la ŝtato devus elspezi pli da mono je dekoj da milionoj da juanoj kaj liveri pli da ŝtalo en kvanto de miloj da tunoj, sed ankaŭ la konstruado ne povus komenciĝi ĝustatempe, nek produkti elektran energion en la jaro 1970.

Tiu reviziisma projekto, karakterizata per malmulteco, malrapideco, malboneco kaj malŝparemo, renkontis fortan oponon de vastaj amasoj de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj, tuj post kiam ĝi estis elbakita.

En la granda proletara kultura revolucio, la konstruaj laboristoj de la elektrejo armitaj per la penso de Maŭ Zedong firme kaptis al si la gvidan potencon de la konstruado de la elektrejo. Kun fidela koro gajni gloron por Prezidanto Maŭ, ili elmetis la batalan sloganon "certigi al la Hidraŭlika Elektrejo de Fuĉun-rivero ekprodukton de elektro je du jaroj pli frue" kaj sinĵetis kun plena fido en la batalon de konstruado de la elektrejo.

Tiuj burĝaraj sinjoroj morte malamamis la projekton de konstruo ellaboritan de la laboristoj, karakterizatan per multeco, rapideco, boneco kaj ekonomio. Ili plengorĝe kriaĉis: "Estas sonĝo esperi ekprodukton de elektro en 1969!" La laboristoj sonore respondis: "Ni iros la luman vojon montritan de Prezidanto Maŭ, kaj ne en la jaro 1969, sed jam en 1968 ni nepre produktos elektron!"

En la giganta akvobaraĵo estas instalitaj 17 arkaj kluzpordoj el kiuj ĉiu havas altecon kaj larĝecon de 14 metroj kaj pezas pli ol 75 tunojn, kun arka radiuso de 16 metroj. Ili estas la plej grandaj el la arkaj kluzpordoj nun en nia lando.

La laborista klaso armita per la penso de Maŭ Zedong povas krei ĉian miraklon en la mondo. La konstruejo de la Hidraŭlika Elektrejo de Fuĉun-rivero kvankam havis nur malgrandan riparejon kun pli ol 400 laboristoj kaj estis malfacile por ĝi mem fari tiom grandajn arkajn kluzpordojn, tamen, la laboristoj fine sukcese plenumis la tutan taskon antaŭdate, post klopodado de pli ol unu jaro, senĉese praktikante, senĉese resumante la spertojn kaj senĉese progresante. Kaj plie en tri monatoj ili venke plenumis la taskon de muntado de tiuj kluzpordoj.

Tiel, la konstruaj laboristoj de la Hidraŭlika Elektrejo de Fuĉun-rivero venke plenumis la batalan taskon de ekprodukto de elektro je du jaroj pli frue, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj disvolvante la revolucian spiriton lukti por ĉiu sekundo.

Plene Konstruiĝis kaj Malfermiĝis al Trafiko la Nankina Jangzi-pontego

POST la malfermiĝo de la fervoja parto de la Nankina Jangzi-pontego al trafiko je la 1-a de la pasinta oktobro, sinapogante sur la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la laborista klaso de nia lando sukcese finkonstruis kun alta rapideco kaj bona kvalito ankaŭ ĝian ŝosean parton je la 29-a de la pasinta decembro. Tiel, jam plene kaj antaŭdate finkonstruiĝis kaj malfermiĝis al trafiko la Nankina Jangzi-pontego — la plej granda moderna ponto projektita kaj konstruita de Ĉinio mem.

Pro granda kvanto da konstruaj laboroj kaj alta postulo en konstrua kvalito, antaŭe oni difinis la 1-an de julio de 1969 kiel la daton de la finkonstruo de la ŝosea parto. Sed antaŭvespere de la nova jaro 1969 ĝi jam estis konstruita kaj tiel la Nankina Jangzi-pontego plene malfermiĝis al trafiko dank' al tio, ke per la penso de Maŭ Zedong kiel armilo la vastaj amasoj de pontkonstruaj laboristoj ĝisfunde kritikis la tutan kompleton de la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la konstruado de la ponto kaj la de ili disemitajn absurdaĵojn kiaj “estas neeble konstrui ĉe Nankino pontegon super Jangzi-rivero sen ‘kelkaj fremdlandaj specialistoj’ ”, senŝanceliĝe efektivigis kaj plenumis la orientilon de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur la propraj fortoj**”, kaj laboris spite al ventegoj, pluvegoj kaj frostoj.

La vastaj amasoj de la pontkonstruaj laboristoj kaj la trupo de PLA garnizonanta ĉe la ponto en arda emocio prezentis la grandan sukceson kiel omaĝon al la Naŭa Tutlanda Kongreso de la granda, glora kaj korekta Komunista Partio de

Ĉinio.

La finkonstruo de la majesta kaj bela Nankina Jangzi-pontego estas granda miraklo en la pontkonstrua historio de la mondo. La fervoja parto longas je pli ol 6,700 metroj kaj la ŝosea parto je pli ol 4,500 metroj. Sur la suba ferdeko de la ĉefa parto estas metitaj du paralelaj trakoj, kiuj ebligas samtempan veturon de du trajnoj en kontraŭaj direktoj; sur la larĝa ŝosea parto de la supra ferdeko povas samtempe veturi kvar grandaj kamionoj unu apud alia. Ĉe ambaŭ finoj de la ĉefa parto de la ponto majeste staras po du kolosaj statuaroj el figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ĉe ambaŭ bordoj, la alkondukaj partoj de la ŝosea parto, proksimaj al urbaj kvartaloj, konsistas el hiperbolaj ark-pontoj kun 22 spanoj, karakterizataj per tradicia nacia stilo kiuj kvazaŭ belaj buntaj rubandoj plielegantigas la grandiozan Nankinan Jangzi-pontegon. Frumatene, sub la radiantanta ruĝa suno, la giganta ponto kvazaŭ ŝtala pluvarko tranĉas la firmamenton; la po tri ruĝaj flagoj super ĉiu pontkapa turo alte flirtas en la aero, eksterordinare ĉarmas la okulojn. Vespere sur la pontego eklumas sennombraj lampoj kies vicoj etendiĝas pli ol dek liojn super la larĝa rivero, kvazaŭ lakta vojo falinta sur ĝin kaj eksterordinare ĉarmigas la belan patrolandon.

La plena finkonstruo kaj malfermiĝo al trafiko de la Nankina Jangzi-pontego interligis la Tiangin-Pukoŭ-an Fervojon kaj la Ŝanhaj-Nankin-an Fervojon — aortojn en la nordo kaj sudo de nia lando, kaj ŝoseojn norde kaj sude de Jangzi-rivero. Tio havas gravan signifon en politiko, ekonomio kaj strategio.



Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekinopera Trupo

SCENO 5

HISTORIO PRI LA REVOLUCIA FAMILIO

La sekvanta posttagmezo.

La hejmo de Li Juhe.

Kiam la kurteno levigas, la avino maltrankvile pensas pri Li Juhe.

Avino: *Venis jam krepusko, sed ankoraŭ ne la filo.*

Malproksime sonas policaĵaj fajfoj.

Tiemej enkuras konsternite kun korbo tra la pordo kaj tuj fermas ĝin.

Avino: Kio okazis, Tiemej?

Tiemej: Malfeliĉe, avino!

*La stratoj bruas en malordo, je tumultoj plenas,
Sur ĉiuj ili gardstarantoj en streĉec' postenas.
Traserĉas ĉie kaj laŭplaĉe homojn arestprenas!
Kaj la stacion de l' fervoj' eĉ plia streĉ' katenas,
Kun brula zorg' pri paĉjo haste hejmen mi revenas.*

Avino: Ne maltrankviliĝu, infano.

*Ĉe via patro ja kuraĝ' kaj singardem' sin trovas,
Li certe iel la japanojn superruzi povas.*

Envenas Li Juhe kun la signal-lanterno kaj manĝskatolo.

Li (*frapante je la pordo*): Tiemej!

Tiemej: Jen paĉjo revenas.

Avino: Bone, tuj malfermu la pordon.

Tiemej (*malfermante la pordon*): Paĉjo!

Li: Jes. Panjo!

Avino: Ja vi revenis, filo! Ho, mi morte maltrankviliĝis.

Li: Vere danĝere, panjo!

Avino: Vi ne sukcesis interligiĝi, Juhe?

Li: Ne. Mi unue kaŝu la objekton! Transdonu al mi la objekton en la manĝskatolo, panjo.

Avino (*signinte al Tiemej ke ŝi gvatu, ŝi malfermas la manĝskatolon*): Nenio estas en ĝi krom kaĉo, Juhe!

Li: Sube de la kaĉo.

Avino elprenis la ĉifrolibron el la kaĉo, forviŝis la kaĉon sur ĝi per sia antaŭtuko kaj ĝin donas al Li.

Tiam Tiemej, starante ĉe la fenestra kurteno, gvasas eksteren kaj atentigas samtempe la movojn de la patro.

Avino: Kial vi tiel aranĝis, Juhe?

Li Juhe kaŝas la ĉifrolibron en fendon en la kolono apud la lito.

Li: Panjo!

Dum ĉe l' kaĉbudo mi kontakti l' akriĝiston provis,

*El hurla aŭt' japanoj saltis, por traserĉi sin movis.
Por ŝirmi min, la akriĝisto ilin al si logis,
Kaj skatolfunde l' ĉifrolibron kaŝe mi enlokis.
Malkaŝi ĝin ne eblis, ĉar mi ja per kaĉ' ĝin kovris.*

Tiemej: Kiel bona estas la onklo tranĉil-akriĝisto, paĉjo. Kio okazis poste?

Li: *Dum korp-traserĉo mi aplombe kun ridet' manovris.*

Tiemej: Ha, lerta vi ja estas, paĉjo. Sed kion ni povas fari ĉiam ĝin tenante hejme?

Li: Ne maltrankviliĝu, filnjo, ni elpensos rimedon por ĝin sendi. Tiemej! (*Li tiras ŝin sidiĝi kontraŭ li kaj diras serioze kaj tre intime*) Vi ja vidis ĉion pri tio. La sekreton mi jam ne plu povas teni de vi. Ĝi estas pli grava ol la vivo. Ni devas teni ĝin eĉ se tio kostos al ni nian kapon.

Tiemej (*naive tamen serioze*): Mi komprenas!

Li: Ha, vi komprenas! Mia filnjo ja estas la plej inteligenta en la mondo!

Tiemej: Paĉjo!

Li: Ha, ha...

Avino: Jen vi patro kaj filino...

Li (*ekrigardante sian poŝhorloĝon*): Panjo, pro afero mi ankoraŭ devas eliri.

Avino: Bone gardu vin kaj revenu frue!

Li: Trankviliĝu, panjo.

Tiemej: Eliru post manĝo, paĉjo.

Li: Ne, mi manĝos post reveno.

Tiemej (*prenas la koltukon kaj donas ĝin al Li*): Prenu ĝin, paĉjo. (*Ŝi metas la koltukon ĉirkaŭ lian kolon.*) Revenu frue.

Li: Bone, trankviliĝu! (*Li foriras.*)

Tiemej: Revenu frue, paĉjo!

Muziko.

Malheliĝas, Tiemej bruligas petrollampon.

La avino respekteme purigas la signal-lanternon.

Tiemej (*rigardante la purigadon de la avino kaj meditante*): Vi ree purigas la ruĝan lanternon, avino?

Avino (*komprenas ke Tiemej provas eltiri informon, sentas ke ŝi devas jam scii la historion de la lanterno kaj konscie diras al ŝi*): Tiemej, ankaŭ vi devas ion kompreni. Venu kaj aŭskultu mian rakonton pri la ruĝa lanterno.

Tiemej: Jes.

Avino: Ni havas tiun ĉi lanternon jam de tridek jaroj. Dum la tridek jaroj, ĝi lumigas la vojon por ni malriĉuloj, ĝi lumigas la vojon por ni laboristoj! Ĝin ne estingas uragano nek fulmotondro, kaj ĝin ne povas forrabi banditoj kaj trompisto. En la pasinteco, tiun ĉi lanternon tenis via avo, kaj nun ĝin tenas via patro. Kiel vi vidis propraokule, ambaŭ okazintaĵoj en la lasta nokto kaj hodiaŭ estas neimageblaj sen ĝi. Memoru, ke la ruĝa lanterno estas la trezora heredaĵo de nia familio.

Tiemej: Ho! Ĝi estas la trezora heredaĵo de nia familio!

Avino: Mi iras prepari vespermanĝon. (*Ŝi demetas atenteme la lanternon kaj iras al la kuirejo.*)

Tiemej (*levas la signal-lanternon por ekzameni ĝin zorgeme kaj poste demetas ĝin malpeze. Ŝi iom plilumigas la petrollampon kaj dronas en mediton.*):

La ĵusaj vortoj de l' avin' pri ruĝa la lanterno, Ne multas sed profundan sencon havas en la kerno.

Ne timas paĉjo, mi mem vidas, riski ja danĝeron, Kaj l' onklo eĉ volonte faris bravan vivoferon.

Ja kion ili celas fine? Venki l' invadantojn, Por la patrion kaj povrulojn savi el sufero.

Laŭ mia pens', farinda estas tia bon-afero, Lernindaj por mi vere estas tiaj batalantoj.

Se la deksepan jaron mian nune mi jam vidas, Do kial tamen mi kun paĉjo zorgojn ne dividas?

Se paĉjo vektoportas ŝarĝon de mil-ĝina pezo, Mi, Tiemej, devas okcent ĝinojn porti, sen eks-

ceso.

Envenas la avino. Ŝi vokas Tiemej, sed tiu ĉi ne aŭdis pro meditado.

Avino: Pri kio vi pensas, Tiemej?

Tiemej: Nenio.

Avino: La manĝaĵo baldaŭ pretiĝos. Ni manĝos kiam via patro estos reveninta.

En la najbara domo infano ekploras.

Avino: Aŭskultu, ĉu ne la najbara Longĉjo ploras?

Tiemej (*rigardante la kurtenon antaŭ la terlito*): Jes ja!

Avino: Povra infano! Ĉu ni havas ankoraŭ iom da maiza faruno?

Tiemej: Jam ne multe, avino! (*La infano ploras denove.*) Ni havas, avino! (*Volante doni helpon*) Mi sendu al ŝi. (*Ŝi prenas maizan farunon.*)

Avino: Bone!

Envenas Gujlan.

Gujlan (*frapante je la pordo*): Avino Li!

Tiemej: Jen fratino Gujlan.

Avino: Ŝi venas ĝustatempe, tuj malfermu la pordon.

Tiemej malfermas la pordon.

Gujlan: Avino Li!

Avino: Ĉu Longĉjo iom resaniĝis, Gujlan?

Gujlan: Multe boniĝis ĝia sano, sed... ni havas nenion hejme por manĝi.

Tiemej: Fratino Gujlan, prenu tion ĉi. (*Ŝi donas al ŝi la bovlon da faruno.*)

Gujlan: Ho... (*Ŝi hezitas akcepti ĝin.*)

Avino: Tuj prenu ĝin. Tiemej ĝuste volas sendi ĝin al vi.

Tiemej (*al Gujlan*): Tuj prenu ĝin.

Gujlan (*transprenante la bovlon*): Vi estas tiel helpemaj al ni, avino.

Avino: Nu, tion ne diru. Kun la muro inter ni, ni estas du familioj. Se ni forigus la muron, ni fariĝus unu familio.

Tiemej: Ni estas unu familio eĉ kun la muro.

Avino: Prave diris mia knabino.

Denove ploras la infano. Envenas Onklino Liu puŝmalferminte la pordon.

Onklino Liu: Gujlan!

Avino: Onklino, vi sidiĝu ĉi tie.

Onklino Liu: Ne plu. Gujlan, la infano denove ploras. Reiru tuj kaj rigardu ĝin. (*Rigardante la bovlon en la mano de Gujlan*) Tio...

Avino: Tuj faru manĝon por la infano. Venu al ni se al vi io mankas.

Onklino Liu: Ej, ankaŭ vi ne riĉas!

Avino: Hej, ni devas iel pasigi la tagojn. Gujlan, tuj faru manĝon por la infano. Ne hastu,

Gujlan, subtenu vian patrinon kaj ne rapidu.

Onklino Liu: Multajn dankojn al vi. (*Eliras kun Gujlan tra la pordo.*)

Avino: Iru malrapide. (*Ŝi akompanas ilin ĝis la pordo.*)

Tiemej (*fermite la pordon*): Avino, diru, kion la familio de Gujlan povas fari? Ŝia edzo estas senlabora kaj la infano malsana. Kiel ili povos sin vivteni en la estonteco?

Avino: Kion oni povas fari en tiu ĉi socio! Ni devas kiel eble helpi ilin.

Tiemej: Jes.

Envenas spiono, falsa kombilvendisto, kiu iras al la pordo de Li Juhe kaj malpeze frapas tri fojojn.

Spiono: Ĉu majstro Li estas hejme?

Tiemej: Iu vokas paĉjon!

Avino: Malfermu la pordon!

Tiemej: Bone. (*Ŝi malfermas la pordon.*)

Eniras la spiono. Muziko eksonas kvazaŭ blovo da diabla vento entrudiĝas. Li ĉirkaŭrigardas la ĉambron, fermas la pordon, kaj demetas la dusakon de sur la ŝultro en angulon.

Tiemej: Vi estas...

Spiono: Vendisto de lignaj kombiloj.

Avino: Ĉu vi havas persiklignajn?

Spiono: Jes, sed oni devas pagi per kontanta mono! (*Li levas la gantitan maldekstran manon.*)

La avino observas lin.

Tiemej (*impulsite*): Vi atendu. (*Ŝi volas iri preni la signal-lanternon.*)

La avino haltigas ŝin kaj bruligas la malgrandan kvadratan lanternon per alumeto.

Tiemej ekkomprenas kaj faras longan enspiron.

Spiono (*iom levas la fenestran kurtenon kaj rigardas ekster la fenestron, ŝajnigante sin gardema. Poste li vidas la malgrandan kvadratan lanternon*): Mil dankojn al la ĉielo, mi ja fine trovis vin!

Tiemej (*forte indignante pro trompiĝo*): Vi?!

Avino (*jetante al ŝi avertan rigardon*): Bone, mastro, montru viajn kombilojn por ke ni povu elekti.

Spiono (*ŝajnigante sin tre sincera*): Mi venas por preni la ĉifrolibron, avino.

Avino: Kion li diris, knabino?

Spiono: Ha! Mi ne havas tempon por ŝerco, avino. La ĉifrolibro estas grava dokumento de la Kompartio. Ĝi destinas la revolucian sorton. Por la revolucio ĉiu minuto estas pli kara ol oro. Tuj ĝin donu al mi!

Tiemej (*eksplode*): Kion sensencan vi babilas? Iru for!

Spiono: Avino, mi...

Tiemej: Ĉu vi ne iros? (*Ŝi puŝas lin.*)

Avino: For!

Spiono: Ej, tion ne faru... mi iros, mi iros.

Tiemej: Tuj jam for!

Tiemej fortege forpuŝas la spionon el la pordo, ĵetas la dusakon al lia sino kaj brue fermas la pordon.

Du spionoj en civilaj vestoj envenas, faras signojn unu al la alia, kaj observe staras ekster la pordo.

Tiemej: De kie venis tiu skabia hundaĉo, avino?

Avino: Mia infano!

Nun ne demandu pri la hund' skabia,

Ankoraŭ venos post ĝi eĉ vipuroj.

Kredeble la sekreton homo fia

Perfidis al fremduloj. (La lastan verson kantu kun forta akcento. Muziko. Streĉiĝas la atmosfero kaj poste la muziko malfortiĝas.)

Tiemej: Mi devas tuj elsendi la ĉifrolibron!

Avino: Ne, jam estas malfrue. La malamiko jam aranĝis kaptilon.

Tiemej: Ho! (*Ŝi kuras al la fenestro por rigardi.*) Avino... (*proksimiĝante al la avino*) Ĉe la piedo de la elektrodrata stango staras homo fikse rigardanta nian pordon!

Avino: Tuj algluu la signon sur la fenestron!

Tiemej: Kia signo?

Avino: La papera papilio kiun eltondis vi laŭ mia diro.

Tiemej: Ĝi estas en la kesto de ŝablonoj.

Avino: Tuj elprenu! Rapidu! Rapidu!

Tiemej (*kuras post la lit-kurtenon kaj elprenas ĝin*): Kiel mi algluu ĝin, avino?

Avino: Malfermu la pordon por ŝirmi lumon antaŭ ol vi algluos. Mi balaos ekstere por ke oni ne rimarku vin.

Tiemej malfermas la pordon kaj la avino prenas balailon. Antaŭ ol ŝi povas eliri, Li Juhe envenas kaj paŝegas en la pordon.

Tiemej (*surprizite*): Ho, paĉjo! (*La papera papilio falas sur la teron*)

La balailo en la mano de la avino falas sur la teron.

Li (*vidante la papilion sur la tero*): Io okazis, panjo? (*Li fermas la pordon.*)

Avino: Estas hundaĉoj ekstere!

La tuta scenejo silentas por momento. La avino dronas en streĉa meditado, Tiemej atendas kun rondigitaj okuloj ke ŝia patro elpensu kontraŭrimedon. Li Juhe maltimas antaŭ danĝero kaj elpensas rimedon.

Li: Panjo, eble mi arestiĝos. En la estonteco se vi bezonos ian helpon, serĉu majstron Ĝou en n-ro 36 de la strato Okcidenta Bordo. Estu singardema.

Avino: Trankviliĝu, filĉjo.

Envenas Hoŭ Hianpu.

Hoŭ (*frapante je la pordo*): Ĉu majstro Li estas hejme?

Li: Oni jam venis, panjo. Tiemej, malfermu la pordon! (*Trankvile.*)

Eniras Hoŭ Hianpu kun rideto. La avino intence balaas, kaj Tiemej algluas la paperan papilion utiligante la intertempon.

Hoŭ: Ĉu vi estas majstro Li?

Li: Jes, sinjoro! Sidiĝu bonvole.

Hoŭ (*kun rikano kaj embarasaj vortoj prezentante invitan karton per ambaŭ manoj*): Ne ĝenu vin, estro Hatojama celebras sian naskiĝtagon hodiaŭ. Li invitas vin al festeno!

La avino kaj Tiemej eksurpriziĝas.

Li (*trankvile*): Kio! Ĉu estro Hatojama invitas min al festeno?

Hoŭ: Jes.

Li: Ho, kia honoro!

Hoŭ: Nur por amikiĝo!

Li: Amikiĝo!



Hoŭ: Nu, iru bonvole, majstro Li!

Li: Bone, iru! — Panjo, (*peze*) bone zorgu vin, mi foriras!

Avino: Iom atendu. Tiemej, alprenu vinon!

Tiemej prenas kaj transdonas vinon al la avino.

Hoŭ: Ha, avino! Ja multas vino ĉe la festeno, kaj tute sufiĉas por li trinki.

Avino (*jetante straban rigardon al li*): Hm, hm!

*La malriĉuloj kutimiĝis al la vino sia,
Kaj ĉiu guto varmon donas al la koro nia.*

Vi ŝatas vinon, filĉjo, sed mi ne permesis al vi trinki; hodiaŭ, mi regalas vin per vino. Filo mia, vi, vi eltrinku ĝin. (*Ŝi donas al li vinon en ne tro granda bovlo.*)

Li (*akceptante la vinon*): Bone, kun via vino ĉe la bazo, mi povos elteni ĉian ajn vinon. Rigardu min trinki, panjo. (*Li diras rigardante al la patrino kun la volo esprimi: revuu mian forton. Per tutkorpa forto li firme tenas la bovlon kaj unuspire eltrinkas la vinon kun ekskuo de la ŝultroj. De lia tuta korpo elspruciĝas fluo da varmego kaj en liaj okuloj kvazaŭ ekbrulas fajreroj*) Dankon, panjo! (*Ĉiu el la silaboj estas kvazaŭ fera.*)

La avino sentas en si fieron.

Li: *Mi trinkas, panjo, vian vinon ĉe l' disiĝa horo,
Je sentimeco de leono plenas mia koro.*

*“Amike” Hatojama min invitas al festeno,
Eĉ mil kaj mil pokalojn trinki lertos mi sen peno.
Kapricas nun la atmosfer’, subitas
ŝtorm’ kaj neĝo,
Do veterŝanĝon zorgu, panjo, kun
atentostreĉo.*

Tiemej: Paĉjo! (*Ŝi sinjetas al Li Juhe kaj ekploras.*)

Li: *Atentu, Tiemej, dum kolport’, pri ĉia
meteo,
Precize notu ĉiujn kontojn en via
memoro,
Atente gardu, kontraŭ hundoj, l’
pardon post laciĝo,
De pig’ atendu, dum malĝoj’, aŭguron
pri feliĉo.
Pri l’ hejmaferoj vi klopodu kun
fervora peno,
Dividu l’ zorgojn kun avinjo tempe
de ĉagreno.*

(*Li karesas la ŝultrojn de Tiemej.*)

Tiemej: Paĉjo! (*Ŝi sinjetas en la sinon de Li Juhe kaj ploradas.*)

Avino: Tiemej, regulon nia familio havas: Neniu devas plori, kiam iu el ni foriras!

Li: Ne ploru, Tiemej! Ĉiam obeu avinon de post nun.

Tiemej: Mi ne ploros! (*Forviŝante siajn larmojn*)
Mi obeos.

Hoŭ: Iru do, majstro Li!

Avino: Malfermu la pordon, Tiemej, por ke via patro iru al la festeno!

Li: Panjo, multe zorgu vin mem! Mi foriras.

Ekpreninte la manon de Li Juhe, la avino lin pririgardas.

Tiemej malfermas la pordon. Enblovas furioza vento. Li Juhe elpordiĝas kun grandaj paŝoj kontraŭ la ventego. Hoŭ levas siajn ŝultrojn por ŝirmi la kolon per la kolumo de sia palto kaj eliras lin sekvante. Tiemej kuras post ili kun la koltuko.

Tiemej: Paĉjo!

Kvar spionoj alkuras kaj baras ŝian vojon.

Spionoj: Reiru! (*Ili perforte devigas ŝin reiri en la pordon, kaj ankaŭ ili eniras la pordon.*)

Spiono A: Pardonon, ni faros traserĉon! Ne moviĝu!

La spionoj lerte traserĉadas kun profesiaj movoj. Tiemej sin premas al la avino. La malamikoj trovas almanakon kaj ĵetas ĝin en la antaŭan lokon. Krome nenion ili trovas.

Spiono A: Iru! (*Li signas al la aliaj kaj foriras kune kun ili.*)

Tiemej (*fermas la pordon, fermtiras la kurtenon kaj ekrigardas la haoson en la ĉambro*): **Avino!** (*Sinĵetas en la sinon de la avino kaj esploras dolore.*)

Avino: Ploru, mia infano, ploru kiel vi volas! (*Ŝi mem ekploretas malgraŭvole.*)

Tiemej: Ĉu mia patro ankoraŭ povos reveni, avino?

Avino: Via patro...

Tiemej: Paĉjo. (*Ŝi ploras.*)

Avino: (*detenante siajn larmojn. Ŝi scias ke malgranda estas la espero reveni sed ŝi ne povas tion diri. Ŝi prenas la koltukon de Li Juhe kaj ĝin karesas.*): **Larmoj** ne povas savi vian paĉjon, knabino! (*Ŝi explore rigardas ŝin.*) Tiemej, nun mi jam devas rakonti al vi pri nia familio!

Tiemej: Kio, avino?

Avino: Sidiĝu, mi diros al vi.

Tiemej: Jes. (*Ŝi sidiĝas sur tabureto.*)

Avino (*ankaŭ sidiĝas*): Respondu al mi, ĉu bona estas via patro?

Tiemej: Bona! Neniu patro en la mondo estas pli bona ol la mia!

Avino: Sed — li ne estas via propra patro!

Tiemej (*surprizite*): Ha! Kion vi diris, avino?...

Avino: Kaj mi ne estas via propra avino!

Tiemej (*pli surprizite*): Kio, avino?! Ĉu vi senprudentiĝis pro indigno?

Avino: Ne, ne, knabino. Ni tri generacioj ja ne apartenas al la sama familio! Via familia nomo estis Ĉen, mia Li kaj tiu de via patro estis Ĝang!

Tiemej (*gape al avino*): Ah?

Avino: *Dum la pasintaj 17 jaroj ŝtorm' kaj pluv' sovaĝis,*

*Paroli pri la travivaĵoj mi eĉ ne kuraĝis,
Pro tim' pri mol' de via vol', kvankam mi deziris
Rakonti al vi foj' post fojo, mi nenion diris.*

Tiemej: Vi povas diri al mi, avino!

Avino: *Verŝajne ne revenos al ni de nun via paĉjo,
Ankaŭ min jam oni ĵetos baldaŭ en karceron.
Ja sendube falos tuj sur viajn ŝultrojn peza ŝarĝo
De la revolucio, aŭdu l' nudan veron,
Sed ne ploradu, Tiemej, nek malĝoju. Staru vi
Firmege, neflekseble kvazaŭ kun ferŝtal-tali'.*

Tiemej: Diru al mi.

Avino: Ej! Tio estas longa rakonto. Kiam la Dongking-fervojo estis kaptita de la japanaj diabloj, mia edzo fuĝis al la sudo de la Granda Muro kaj fariĝis riparisto en la Giang-an-a Inĝeniera Sekcio. Li havis du metilernantojn. Unu el ili estis via propra patro, Ĉen Ĝihing.

Tiemej: Ĉen Ĝihing, mia propra patro?

Avino: La alia estis via nuna patro, Ĝang Juhe.

Tiemej: Ĝang Juhe!?

Avino: Tiam la lando estis en ĥaoso pro la bataloj inter militaristoj. Kaj poste, (*Ŝi stariĝas.*) naskiĝis la Komunista Partio de Ĉinio kaj ekgvidis la ĉinan popolon revolucii. En februaro de 1923, la laboristoj de la Pekin-Hankoŭ-a Fervojo starigis sian ĝeneralan sindikaton en Ĝengĝoŭ, sed militaristo Vu Pejfu, lakeo de fremdlandaj invadantoj, barbare tion malpermesis. La ĝenerala sindikato donis ordonon kaj ĉiuj laboristoj sur la linio ekstrikis. Pli ol dekmil laboristoj en Giang-an manifestaciis sur stratoj. Ĝuste en tiu nokto, tiel malvarma kaj malluma kiel nun, mi estis tiel sopiranta pri via avo ke mi povis nek sidi trankvile nek endormiĝi, kaj flikis veston sub la lampo. Tiel pasis iom da tempo, kaj subite mi aŭdis iun frapi sur la pordo: "Onklino, onklino, tuj malfermu la pordon." Mi tuj malfermis la pordon. Ho, eniris iu en konsterniĝo.

Tiemej: Kiu?

Avino: Via patro.

Tiemej (*surprizite*): Mia patro?!

Avino: Jes, via nuna patro. Lia tuta korpo plenis de sangmakuloj kaj vundoj, kaj en sia maldekstra mano li tenis tiun ĉi lanternon . . .

Tiemej: Tiun ĉi lanternon?

Avino: Per sia dekstra brako li tenis bebon!

Tiemej: Bebon . . .

Avino: Bebon malpli ol unu-jaran!

Tiemej: Kiu ĝi estis? . . .

Avino: Neniu alia . . .

Tiemej: Kiu?

Avino: Vi!

Tiemej: Mi!?

Por emfazi la animstreĉecon, la supraj diroj devas sekvi tuj unu alian en rapida ritmo.

Avino (*urĝeme*): Firme premante vin ĉe sia sino, kun larmoj en siaj okuloj, via patro staris antaŭ mi, (*Tiemej fiksas sian rigardon al la avino senspire.*) kaj rigardis min gape, povante diri nenion dumlonge. Kun timo mi urĝigis lin paroli. Li . . . li diris: "Miaj majstro kaj kunlerna frato Ĉen . . . martiriĝis! Tiu ĉi bebo estas ido de frato Ĉen kaj posteulo de la revolucio! Mi devas flegi ŝin por daŭrigi la revolucion!" Li ripete kriis: "Onklino! Onklino! De nun mi estas via propra filo kaj la bebo via propra nepino." Kaj poste mi . . . mi tuj ekprenis kaj premis vin firme al mia sino.

Tiemej: Avino! (*Ŝi ekkrias kun tirata voĉo kaj sin ĵetas en la sinon de la avino.*)

La avino firme brakumas Tiemej kaj ŝin karesas. Nun malrapidiĝas la ritmo. La avino malrapide ellasas



Tiemej. Antaŭ tio la ritmo devas esti hasta, precipe la frazoj en la supra parto devas esti urĝeme elparolitaj. Tion oni faru ne nur kun profunda kompreno, sed ankaŭ kun heroa temperamento kaj alta tono, tamen sen troa sentimentaleco.

Tiemej: Avino . . . (*Ŝi ploras pli dolore.*)

Avino: Ne ploru. Tenu vin firma kaj aŭskultu!

*Pro l' striko la gepatrojn viajn kruelege buĉis
kanibaloj,*

*Li Juhe klopodadis por l' efektivigo de l' revolucia
idealo.*

*Li ĵuris marŝadi pluen kun relumigita lanterno
ruĝa por signalo.*

*La sangmakulojn li forviŝis, la mortintojn en-
terigis kaj reiris al batalo.*

*Bruligojn, rabojn, hombuĉadojn faras ĉe ni la
japana banditaro,*

*Vi proprokule vidis, ke la patro via arestiĝis
fare de l' vandaloj.*

*La sangan ŝuldon notu en la kontolibron de la
koro,*

Strebadi al la alta cel' kun ŝtala volo,

*Por kvitigi l' malamikon de l' sangŝuld' per sango
en egalo.*

Tiemej: Avin' rakontis al mi pri l' heroaj, oferemaj
revolucianoj,

*Ja mi naskiĝis kaj kreskadis en sovaĝaj uraga-
noj.*

*Avino kara, via amo en la deksep-jara guver-
nado ja profundas kiel oceano.*

*De hodiaŭo, kun okuloj akraj mi strebados al la
alta celo.*

*Por kviti l' sangan ŝuldon ja ne eviteblos
sangofero.*

*La posteuloj devas plu daŭrigi la aferon de
la pioniroj,*

*Mi alte tenas la lanternon ruĝan, ke ĝi
lumu kun potencaj briloj. . .*

Paĉjo!

*Simila al pinarbo verda paĉjo estas plej
firmvola,*

*Li estas kompartia membro, viro brava,
fidelkora.*

*Sekvante lin kaj senhezite mi antaŭen iras.
Tenata alte la lanterno ruĝa disradie brilas,*

*Ke mia patro en la lumo la hommanĝajn
bestojn ĉasu,*

*Kaj ilin ni, generacio post generaci', frakasu,
Ĝis finekstermo de l' bestaĉoj ni la batalejon
ne forlasu!*

Tiemej kaj la avino alte levas la ruĝan lanternon, kaj ruĝiĝas la tuta scenejo.

— La kurteno falas.
(daŭrigota)

La Plej Alta Komandejo de la Tajlanda Popola Liberiga Armeo Proklamis Sian Fondiĝon

LA situacio de la arma batalo de la tajlanda popolo estas bonega kaj fariĝas ĉiam pli kaj pli bona.

En la novjara tago de 1969, naskiĝis la Tajlanda Popola Liberiga Armeo gvidata de la Komunista Partio de Tajlando, kaj ĝia Plej Alta Komandejo proklamis sian fondiĝon. Tio estas alia brila venko de la popola arma batalo sub la gvido de la Komunista Partio de Tajlando. Ĝi fortege stimulis la revolucion batalvolon de la tajlanda popolo kaj skuis la regadon de la usona kaj tajlanda reakciularoj.

La unua batala trupo de la tajlandaj popolaj armitaj fortoj por batali kontraŭ la subpremado kaj agresado de la usona kaj tajlanda reakciularoj fondiĝis en novembro de 1956. La Komunista Partio de Tajlando kaj la de ĝi gvidataj armitaj fortoj profundigis en la vastan kamparon, mobilizis kaj organizis kamparanojn kaj persistis je longdaŭra arma batalo. Kaj uzante la strategion kaj taktikon de popola milito, ili atakas la malfortecon de la malamiko per sia forteco, lerte kaj sagace batis la malamikon. Dum la pasintaj pli ol tri jaroj, ili faris pli ol mil batalojn kontraŭ la malamiko, fojrefoje frakasis la kontraŭrevolucion militan "sieĝekstermon" de la reakciularo, ekstermis grandan kvanton da efika forto de la malamiko. Kaj la popolaj armitaj fortoj pli kaj pli fortiĝis kaj grandiĝis dum la batalado.

Nun, la gerilaj regionoj de la tajlandaj popolaj armitaj fortoj dissemiĝis tra la lando kaj la skalo kaj intenseco de ĝiaj bataloj ĉiam pli grandiĝis. En tiu stato, post sia fondiĝo la Plej Alta Komandejo de la Tajlanda Popola Liberiga Armeo pli efike komandos en la bataloj.

La Plej Alta Komandejo de la Tajlanda Popola Liberiga Armeo en la novjara tago publikigis deklaron kaj donis ordonon al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la armeo.

La deklaro diras, ke la liberiga armeo fondita kaj gvidata de la Komunista Partio de Tajlando estas armeo formita el batalantoj kun alta revolucia konscio, armeo formita el veraj filoj de la popolo, armeo servanta al la popolo tutkore kaj tutanime, strikte ligiĝanta kun ĝi, posedanta altan konscion de disciplino kaj konservanta unuecon inter la oficiroj kaj batalantoj.

La deklaro emfazas: Nia grava politika tasko estas konduki propagandon inter la amasoj, organizi, armi kaj helpi ilin starigi revolucionan regpotencon.

La deklaro montras, ke nun la usonaj imperiismaj agresantoj kaj la naciperfida Thanomkliko agas en koluzio unu kun la alia kaj komplete detruis la nacian sendependecon kaj popolan demokration de Tajlando. Ili kruele subpremas kaj ekspluatas la popolon, kruele premegas kaj masakras ĝin, kaj tio flamigis koleron en la koroj de la patriotaj popolanoj. La Uson-Thanomkliko certe pereos en la pafbruoj de la popola milito.

La ordono de la Plej Alta Komandejo de la Tajlanda Popola Liberiga Armeo al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj alvokis la lastajn studi kaj bone posedi la penson de Maŭ Zedong, vaste disvolvi popolan militon kaj batali ĝisfine por ekstermi la usonan kaj tajlandan reakciularojn!

La ordono alvokis krome al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj: **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon."**

Komsomolo de Sovetunia Reviziismo

Estas Instrumento por Restaŭri

Kapitalismon

POR restaŭri kapitalismon en Sovetunio, la sovetunia reviziisma renegata kliko delonge utiligas la Komsomolon de Sovetunio kiel gravan instrumenton por efektiviĝi kontraŭrevolucion reviziisman linion kaj batalakiri al si la junan generacion konkure kun la proletaro.

La Komsomolo de Sovetunio estas fondita de la granda instruanto de revolucio Lenin en 1918. Je la komenco Lenin jam klare difinis la karakteron de Komsomolo de Sovetunio kaj determinis komunisman direkton de la junulara movado. En sia cirkulero pri fondo de Komsomolo, la Centra Komitato de la Rusa Komunista Partio (B.) difinis: “La Rusa Komunisma Ligo de Junularo estas lernejo kie sin preparas novaj konsciaj komunistoj.” Lenin ankaŭ klare montris ke la komsomolanoj devas studi komunismon, kaj ke la komsomolanoj kaj junuloj devas **“ligi ĉiun paŝon de sia studo, eduko kaj trejnado kun la senĉesa batalo de la proletoj kaj laboruloj kontraŭ la malnova socio de ekspluatantoj.”**

Sub la gvido kaj intima zorgo de Lenin kaj Stalin, la Komsomolo de Sovetunio faris komunisman edukon al la vastaj amasoj de sovetuniaj junuloj kaj elkulturis multajn novajn homojn kun komunisma konscio. En la severaj tagoj de la enlanda milito kaj de la granda Patriodefenda Milito, la komsomolanoj faris reflekseblan batalon kontraŭ la en- kaj ekster-landaj klasaj malamikoj por defendi la fruktojn de la Oktobra Revolucio kaj firmigi la diktaturon de la proletaro; kaj en tio ili montris sian sentiman heroismon, kaj aperis inter ili multnombraj herooj.

INOKULI LA NIGRAN VARON DE “ESTINGIĜO DE KLASBATALO” AL JUNULOJ

Post kiam la sovetunia reviziisma renegata kliko uzurpis la gvidan potencon de la Partio kaj registaro de Sovetunio, ĝi ĉiam parolas pri neceseco por junuloj studi komunismon, sed fakte tio, kion ĝi igis ilin studi, estas reviziismo. La

sovetunia reviziisma renegata kliko kastris la klasan enhavon de la instruo de Lenin pri studo de komunismo, atakas la doktrinon de Lenin pri la diktaturo de la proletaro, kaj plenforte inokulas al la vasta junularo la nigran varon de “estingiĝo de klasbatalo”. Ili babilaĉas, ke “jam ne ekzistas klasoj en la sovetunia socio”, ke en Sovetunio jam “estis komplete eliminataj ĉiuj sociaj kaŭzoj produktantaj ekspluaton de homo al homo”, kaj ke sole “ekzistas amikaj klasoj kaj grupoj de laboruloj, kaj unuecaj estas iliaj ekonomiaj, socipolitikaj kaj ideologiaj interesoj” ktp. Ili plene neas la ekziston de serioza klasbatalo inter la burĝaro kaj proletaro en Sovetunio kaj neas la revolucion kaj diktaturon de la proletaro.

Kun sia aparta intenco la sovetunia reviziisma renegata kliko distordas la esencon de studo de komunismo kiel klopodon ĉefe por ekposedi sciencan kaj scion, absurde dirante, ke posedante teknikon oni povas iri en komunismon. En iu plena sesio de la Centra Komitato de la Komsomolo, la ĉefo de sovetuniaj reviziistoj Breĵnev distrumpetis, ke la Komsomolo de Sovetunio devas esti “enkorpiganto kaj kreanto de la plej altaj atingoj de la moderna scienco kaj kulturo, sen tio la vera komunismo ne povas esti konstruita”. Okaze de “celebrado” de la kvindeka datreveno de fondiĝo de la Komsomolo, la parolilo de la sovetunia reviziismo *Pravda* multe parolis en sia ĉefartikolo pri “studo de komunismo”. Ĝi senkaŝe kolportis la reviziisman ĉifonaĵon, dirante ke “studi komunismon en la modernaj kondiĉoj signifas posedi novajn sciencajn kaj teknikajn sciojn, scivoleme serĉadi efikajn vojojn por disvolvado de socia produkto”. La gazeto *Komsomola Pravda*, organo de la sovetunia reviziisma Komsomolo, ankoraŭ pli malkaŝe distrumpetis, ke la tasko de junuloj estas “lerni kulturon”, “ĉu la burĝara kulturo aŭ la proletara, tio provizore ne gravas”. Per tio ĝi klopodas konduki la vastajn amasojn de sovetuniaj

junuloj al erara vojo de tekniko metita sur la unuan lokon kaj nefaro de revolucio.

KORUPTO DE LA VASTA JUNULARO PER LA BURĜARA IDEOLOGIO

Parolante pri komunisma eduko Lenin emfazis en sia fama parolado *La Taskoj de Ligoj de Junularo*, ke oni devas preni la tutan aferon de eduko de junuloj kiel “aferon eduki la junularon per komunisma moralo”. Lenin plie montris ke la komunisma moralo estas tio, kio “unuigas la laborulojn por oponi kontraŭ ĉiu ekspluato kaj ĉiu etprivata posed-sistemo”. Sed la sovetunia reviziisma renegata kliko plenenergie inokulas al la junuloj pere de la Komsomolo burĝaran ideologion, kiu havas nenion komunan kun la komunisma moralo kaj kies kerno estas egoismo. Ĝi koruptas la vastajn amasojn de junuloj per la burĝaraj ideoj, kiaj ĉasado de famo kaj specialisteco, epikurismo, kaj ĉiopoveco de rublo, *Komsomola Pravda* senbride distrumpetas, ke la celo de la vivo de junuloj estas “fariĝi bona specialisto kaj majstro en sia fako, edziĝi kaj naski gefilojn”. Ĝi senhonte propagandas, ke “la mono estas fundamenta movforto; kiu estas riĉa, tiu estas feliĉa” ktp. Eĉ en la ĉiutaga agado de la Komsomolo, la sovetunia reviziisma renegata kliko vaste aplikas materian stimulon kaj ĉie metas la rublon kaj premion sur la komandan lokon. Ĝi plie utiligas distribuon de novaj loĝejoj kiel logaĵon por ĉiurimedepuŝi la vastajn amasojn de sovetuniaj junuloj en marĉon de burĝara mamoniismo, provante fari junulojn tiaj filistroj kiajn Lenin kritikis en *Taskoj de Ligoj de Junularo*: “Mi ĉasas mian profiton kaj ĉio alia ne koncernas min.”

La sovetunia reviziisma renegata kliko krome utiligas la Komsomolon por plenforte disvastigi la vivmanieron de la burĝaro kaj “okcidentan civilizacion” por korupti la volon de junuloj. Frue jam en 1962, la moskva Komsomolo kaj moskva filio de Ligo de Komponistoj kune aranĝis la unuan ĵaz-festivalon en Moskvo, kaj per tio ili malfermis vojon por disvastigo de la okcidenta frivola muziko en Sovetunio. En multaj lokoj estas establita ĵaz-kluboj kaj junulaj kafejoj sub la komitatoj de la Komsomolo de diversaj niveloj. Dum la nokto, lumas malforte koloraj lampoj, tintas vinpokaloj kaj fumoj nubigas en tiuj kafejoj, kiuj per oreltranca ĵazmuziko kaj maldeca balandanco (a. *rock and roll*) ruinigas junulojn mense kaj korpe. La sovetunia reviziisma Komsomolo ne ŝparas sian forton ankaŭ por disvastigi laŭmodajn fasonojn kaj furorajn modelojn de

hararanĝo de la Okcidento. En ne malmultaj lokoj estas publike establita “Komsomolo-junulaj salonoj” por studi hararanĝon de la burĝaro. Per ĉiuj rimedoj la sovetunia reviziisma renegata kliko klopodas turni la komsomolajn organizojn en klubojn, kiuj kolportas burĝarajn vivmanierojn, por ke ili servu al ĝia krima celo de restaŭro de kapitalismo.

Sub la preteksto de plena disvolvado de “soci-politika aktiveco” de la Komsomolo, la sovetunia reviziisma renegata kliko starigis serion da tiel nomataj “publikaj organizoj”, kiaj “Komsomola Komandejo”, “Kontrola Posteno de Komsomolo”, “Popola Milico”, “Kamarada Juĝejo” k. a., kaj pere de tiuj organizoj ĝi preparas por si helpantojn kiuj speciale servas en batado kaj persekutado al tiuj, kiuj ne kontentiĝas pri la krimoj de la sovetunia reviziisma renegata kliko.

PROMOCII BURĜOJN KAJ FORPUŜI LABORISTAJN KAJ KAMPARANAJN JUNULOJN

La sovetunia reviziisma gvidanta kliko ankaŭ praktikas kontraŭrevolucionan reviziisman organizan linion en la Komsomolo. Ili laŭde levas burĝarajn intelektulojn ĝis la ĉielo, nomante tiujn junajn “specialistojn” “nerva centro de la Komsomolo” kaj “animo de la komsomola organizo”, kaj tiel ili ŝovis la gvidantecon de la Komsomolo en la manojn de la privilegia tavolo el burĝaraj intelektuloj.

La sovetunia reviziisma gvidanta kliko laŭdegis la burĝarajn intelektulojn ĝis la ĉielo kaj samtempe plenforte forpuŝas laboristajn kaj kamparanajn amasojn, tiel ke pli kaj pli malaltiĝas la procento de laboristoj kaj kamparanoj en la Komsomolo. En 1967, sub la preteksto de “ŝanĝo de komsomolaj kartoj”, la sovetunia reviziismo forpuŝis el ĝi multnombrajn komsomolanojn devenantajn de laboristaj kaj kamparanaj familioj farante grandskalan purigon en Komsomolo. Dum la ŝanĝo de komsomolaj kartoj en bazaj organizoj en la urbo Mirnej ĉirkaŭ 200 personoj estis eksigitaj el la Komsomolo en la daŭro de kelkaj tagoj. La laboristino Polina Borodinskaja ne povis ĉeesti kunvenon, kiam ankoraŭ ne pasis la tempo de forpermeso pro akuŝo. Pro tio ŝi estis eksigita el la Komsomolo. Alia laboristo Boris Miĉkov faris kritikojn al gvidanto kaj estis subite eksigita el la Komsomolo.

La damnindaj krimoj de venenado kaj koruptado de sovetuniaj junuloj fare de la sovetunia



SUKCESE BATALAS LA LAOSAJ PATRIOTAJ ARMEANOJ KAJ POPOLANOJ

En 1968, disvolvante la senkomparan potencon de popola milito la laosaj patriotaj armeanoj kaj popoloj faris 1,460 batalojn kaj sume ekstermis pli ol 20,000 malamikojn inkluzive multajn "konsilantojn" de Usono, Tajlando kaj suda Vjetnamio kaj militajn personojn de landoj dependantaj de Usono, militakiris pli ol 6,300 diversajn armilojn, difektis 72 militajn veturilojn, subakvigis 44 ŝipojn kaj motorboatojn, faligis aŭ detruis 170 usonajn piratajn aviadilojn, ruinigis aŭ detruis multajn malamikajn pontojn, tenejojn, bazojn de postfronta provizo, aerodromojn, kanojnajn poziciojn kaj instalaĵojn de radaro.

La totala sumo de malamikoj ekstermitaj de la laosaj patriotaj armeanoj kaj popoloj en 1968 pliiĝis je 30% ol tiu en 1967, la sumo de kaptitoj pliiĝis sepoble, kaj la sumo de kapitulacaj malamikoj pliiĝis 2.5-oble.

PLI KAJ PLI FORTIĜAS LA PALESTINA TRUPO "ŜTORMO"

Depost sia fondiĝo en la 1-a de januaro 1965, la avangarda organizo Ŝtormo apartenanta al Fatah (la Naciliberiga Movado de Palestino) senĉese akiris venkojn en sia armita batalado kontraŭ la juda cionismo de Izraelo por liberigi Palestinon. La statistika komunikado, publikigita de Fatah je la novjaro, anoncis ke en la batalado en la pasintaj kvar jaroj estis mortigitaj

sume 3,650 soldatoj kaj 44 oficiroj de izraela agresa armeo. La komunikado ankaŭ diris, ke en tiu periodo, la trupo Ŝtormo detruis ankaŭ 658 militajn veturilojn, 40 municiejojn, 74 centrojn de trupoj, kvar militajn vagonarojn, 16 aviadilojn kaj 70 gardstarejojn de la izraelaj agresantoj.

Tra la centoj da bataloj dum la kvar jaroj, la trupo Ŝtormo plifortiĝis tagon post tago. Nun ĝia aktivada sfero jam disvastiĝis al diversaj okupitaj lokoj de Palestino.

GRANDA STRIKO DE USONAJ DOKISTOJ

De la lasta tagdeko de la pasinta decembro ĝis la komenco ĉi-jare, 75,000 dokistoj ĉe la orienta marbordo de Usono kaj la Meksika Golfo okazigis grandan strikon por oponi kontraŭ la kruela ekspluato de kapitalistoj.

Kaŭze de tiu ĉi granda striko paraliziĝis ĉiuj havenoj de Maine en nordorienta Usono ĝis Texas en suda Usono. Centoj da ŝipoj kateniĝis en tiuj havenoj. Pro tiu striko multaj fabrikoj kiuj produktas per krudaj materialoj rabitaj el kolonioj kaj duonkolonioj, devigate reduktis aŭ ĉesigis sian produktadon, iuj eĉ fermiĝis. En unu semajno de la unua tagdeko de januaro Usono eksportis nur 4,500,000 buŝelojn da greno, kun malpliiĝo de pli ol 85% kompare kun la 31,900,000 buŝeloj en la sama periodo de la pasinta jaro.

Tiu ĉi striko donis pezan baton al la kliko de usona monopola kapitalo.

reviziisma renegata kliko vekis indignon de la vasta sovetunia popolo. Nemalmultaj kun granda indigno diris: "Nun la Komsomolo ne estas tia, kia ĝi estis en nia tempo."

La vastaj amasoj de sovetuniaj komsomolanoj kaj junuloj, kiuj posedas glorajn revoluciajn tra-

diciojn, ne forgesos la instruojn de Lenin kaj Stalin. Ili nepre levos la standardon de Lenin kaj Stalin, leviĝos por fari revolucionan batalon kaj fine renversos la regadon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj restarigos la diktaturon de la proletaro sur la vasta soveta tero.



Ruĝas Mandarinoj sur Jingpan-monto

Kiam la Centra Kolono de la Ĉina Laborista-kampana Ruĝa Armeo atingis Jongning-gubernion de Siĉuan dum la Longa Marŝo, ĝiaj batalantoj jam du tagojn ne sate manĝis. Ni tre maltrankvigiĝis. Ĉar la tasko de nia antaŭira labora taĉmento estas ne nur fari survoje propagandon al la amasoj, organizi armitajn fortojn de la amasoj kaj aranĝi ĉion por vunditoj kaj malsanuloj, sed ankaŭ garantii provianton al la trupoj. Sed en la vilaĝoj kaj urbetoj, kiujn ni trapasis, ĉiuj troveblaj lokaj tiranoj estis jam "punitaj" de la antaŭiraj trupoj. Kaj pro manko de kono pri la Ruĝa Armeo kaj timo al milito, multaj el la popolanoj jam foriris, tial ne eblis al ni aĉeti eĉ iom da greno. Mi povis fari nenion alian kaj decidis iom pririgardi en la domoj de vilaĝanoj. Mi pensis en mi: Se mi trovos grenon, mi prenos la grenon kontraŭ pago laŭ la merkata prezo kaj klarigos la aferon per letero. Enirinte en la domon de iu vilaĝano, mi trovis monon en grena vazo kaj krome slipon kun skribo: "Onklo, ni kore petas vian pardonon. Ni estas batalantoj de la Laborista-kampana Ruĝa Armeo kaj ne manĝis jam de du tagoj. Survoje ni venas al via vilaĝo, kaj vi ne estas hejme. Tial ni devis manĝi iom el via greno. Nun ni postlasas al vi la pagon laŭ la merkata prezo. Akceptu ĝin kaj pardonu." Evidente, la mono kaj slipo estas postlasitaj de frataj trupoj. Mi eniris en alian domon kaj trovis ankoraŭ iom da greno en vazo, tio tre ĝojigis min. Sed post atenta rigardo, mi trovis ankaŭ slipon, sur kiu estis skribite: "Kamaradoj,

ni jam manĝis iom el la greno de tiu ĉi familio do vi ne tuŝu plu la postrestintan grenon en la vazo, por ke la mastro havu ion por manĝi post sia hejmenreveno." Leginte la slipon, mi tre admiris la ĝustan konduton de la kamaradoj de frataj trupoj kaj ĝoje forlasis la domon.

Mi komprenis, ke en tiu ĉi vilaĝo mi ne sukcesos akiri grenon, kaj povis nur provi en aliaj vilaĝoj. Sed ankaŭ aliloke mi ne akiris grenon, kvankam mi vizitis plurajn vilaĝojn.

Tiam parto de niaj trupoj sieĝis malamikojn en la gubernia urbo de Jongning kaj la ĉefa forto jam movis sin al Jingpan-monto. Do nia antaŭira labora taĉmento haste marŝis tiep. Alveninte al la montpiedo, ni vidis, ke la monto estas plena de oraj mandarinoj. Ni aŭdis alvokon de sur la monto: "Kamaradoj! rapidu! Suriru la monton por manĝi mandarinojn!" Pro malsato kaj laco, jam mankis al la kamaradoj forto por surgrimpi la monton. Sed kiam ili aŭdis ke sur la monto oni povos manĝi mandarinojn, ili tuj revigliĝis kaj urĝigis la antaŭirantajn. Mi pensis, ke mandarinoj kvankam ne povas anstataŭi grenon, tamen, ili povos pli malpli solvi nian nunan malfacilon, se ni sukcesos aĉeti certan kvanton. Do mi rapidis al la fronto de la trupo. Dum la irado mi rigardis la senfinan mandarinan arbaron kaj taksis en mi, kiom da fruktoj havas unu arbo kaj por kiom da homoj ĝi sufiĉas.

Ni pli kaj pli proksimiĝis al la arbaro, kaj la mandarina aromo

ŝvebis en la aero. La batalantoj interbabilis:

"Kiel bonaj mandarinoj! Ĉiu arbo donas 200 ĝinojn minimume!"

"Vidu, kia domaĝo, multaj jam falis sur la teron kaj neniu zorgas pri tio"

"Ĉu nun ni jam povas ricevi kelkajn ĝinojn..."

"Ne necesas paroli pri kelkaj ĝinoj", tuj interrompis alia batalanto, "donu al mi du mandarinojn, kaj mi garantios al vi unuspire sturmi 30 liojn!"

Ĉie en la trupoj estis paroloj pri mandarinoj. Mi rapidigis la paŝojn, venis al la arbaro kaj atente pririgardis. Ho! la fruktoj tiel dense pendis, ke ili peze kurbigis la branĉojn. La fruktoj jam maturiĝis kaj la falintaj kovris la teron sur vasta spaco. Sed neniu el niaj batalantoj eniris la arbaron por preni fruktojn. Mi tre admiris en mi la konscian observon de la batalantoj al la "tri ĉefaj reguloj de disciplino kaj ok punktoj de atentigo" laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

Mi daŭre iris antaŭen kaj subite vidis maljunulon starantan apud la arbaro. Li tenis kelkajn grandajn mandarinojn en la manoj kaj klopodis enmanigi ilin al la batalantoj. Iu el la lastaj akceptis la mandarinojn, kaj por tio ŝovis monon en la manon de la avo. Sed la avo neniel volis ĝin akcepti. Povante fari nenion alian, la batalanto redonis al la avo la mandarinojn kaj rapide foriris. Vidante ke li jam estas for, la avo ree klopodis enmanigi la mandarinojn al la

postaj batalantoj. Sed nun neniu el la batalantoj plu akceptis ilin. Ĉiuj unuvoĉe diris: "Dankon, avo. Ni estas ruĝaj armeanoj, kiuj ne povas senpage manĝi ion de la amaso."

Kiam mi venis al la avo kaj ankoraŭ ne havis tempon por diri ion, li jam enmanigis al mi la mandarinojn. El lia ĉifona vesto kaj sunbruna vizaĝo, mi vidis, ke li estas honesta kamparano. Sed pro manko de kono pri la Ruĝa Armeo, li montris sin iom maltrankvila. Mi demandis lin: "Avo, ĉu la mandarina arbaro estas via?" "Ne, ne! Ne demandu kies arbaro ĝi estas, vi nur manĝu!" La maljunulo ne respondis rekte mian demandon sed ree klopodis enmanigi al mi la mandarinojn. "Se

ĝi apartenas al vi, ĉu vi povas vendi iom da fruktoj al ni, ĉar ni..." "Vi ne bezonas pagi, tute ne bezonas pagi. Manĝu, nur manĝu!" Min interrompis la maljunulo.


El lia ĉifona vesto mi konjektis, ke kiel malriĉa kamparano li absolute ne povas posedi tian vastan mandarinan arbaron. Post enketo en vilaĝoj sub la monto, mi sciigis, ke la mandarina arbaro apartenas al iu loka tirano. Poste, mi ripetade klarigis al la arbargardanta maljunulo la politikon de la Ruĝa Armeo, kaj tiu ĉi maljunulo fine diris al mi la veron. Mi alprenis tabulon kaj sur ĝin skribis:

Tiu ĉi mandarina arbaro estis propraĵo de la loka tirano kaj estas konfiksita nun. Ĉiu preterpasanta trupo devas kolekti mandarinojn

en organizita maniero kaj asignita dividparto.

La antaŭira laborataĉmento de la ĝenerala komandejo de la Ĉina Laboristakamparana Ruĝa Armeo

Malaperis nun la maltrankvilo de la avo, kiam li vidis ke mi finskribis la anoncon. Sub la gvido de la avo mi dividis la arbaron en kelkajn partojn por asigni po unu al ĉiu el la trupoj kaj ankaŭ unu al la tieaj malriĉaj kamparanoj. Post la divido, mi daŭrigis mian vojiradon. Vidante, ke la batalantoj gaje manĝas mandarinojn, ankaŭ mi sentas eksterordinaran ĝojon.



Leganto G. N. de Nederlando

Min ege imponas la artikolo "Grenejo el Kalva Monto". Kun kreskanta admiro kaj respekto mi legis pri la kvazaŭ superhomaj fortostreĉoj kaj inventiva saĝeco de bravaj, kuraĝaj kooperativanoj, inspiritaj de la Komunista Partio sub la gvido de Prezidanto Maŭ, kiuj tiel entuziasme laboregis por fari irigacion en la malmola ŝtona tero. Plie mi estas tre emociita de heroo sinofero de k-ro Men He, kiu protektis per sia vivo 27 siajn klasfratojn. Cetere ĉiuj aliaj artikoloj, rubrikoj kaj kolorbildoj tre plaĉas al mi. Ĝenerale mi povas diri, ke via organo El Popola Ĉinio estas tre ŝatata de mi!

Leganto R. R. de Italio

Al mi plaĉas ĉiuj artikoloj, rubrikoj kaj belegaj kolorfotoj de via revuo "El Popola Ĉinio", sed precipe interesas min ĉiuj laŭdindaj, mirin-

daj progresoj de terkulturo; ĉar mi estas pasinta terkulturisto.

Pere de via belega revuo mi konas nun, pli bone ol antaŭe, vian grandan progreseman landon!

Kiel supre dirite, al mi plaĉas via tuta revuo kaj mi legas kun granda intereso.

Mi ne havas opiniojn kaj proponojn por vin konsili. Lastatempe via revuo estas laŭdata per ĉiuj formoj en nia itala esperanta revuo. Iru ĉiam antaŭen por la bono de via lando kaj de nia granda internacia lingvo!

Leganto M. K. de Germanio Okc.

La revuo "El Popola Ĉinio" estas tre bona revuo, tre bone ilustrata kaj sufiĉe klare kaj kompreneble esprimata. La enhavo plaĉas al mi. Menciindaj estas la koloraj bildoj kaj fotoj. Post la finiĝo de mia abono mi daŭrigos.

Leganto C. C. de Francio

La artikoloj estas bonaj, ili spegulas la grandan evoluon de la P.Ĉ. La koloraj fotoj estas mirindaj; mi laŭdas vin.

Certe mi ŝatas ĉiujn informojn el via lando, ĉar ĉi tie, ni konas pere defalsaj informoj; tio estas ordinara.

Oni povas per nenia maniero kompari la vivon en la kapitalisma lando. Tiu ĉi lasta sistemo puŝas al senfino produkton, sed en la distribuo de la produktaĵo ekzistas tiom da difekto, ke la detruigo estas finfine evidenta kaj kiom da horoj, kiom da laboroj estis perditaj sen profito.

De tiu ĉi numero ni malfermas specialan rubrikon de Lecionoj de Ĉina Lingvo, por kontentigi la deziron de multaj legantoj, kiuj skribis al ni por peti tion. La lecionoj konsistos el tri partoj: teksto el ĉinaj ideografiaĵoj, sama teksto skribita en fonetika alfabeto de han-lingvo kaj Esperanta traduko laŭvorta kaj laŭsenca.

La legantoj estas petataj skribi al ni siajn opinion kaj sugestojn.

— La Red.

一个 外国 小朋友 的 愿望
Yige Wàiguó Xiǎopéngyou de Juànwàng
Iu Fremdlanda Amiketo (de) Deziro

有个 外国 小朋友 說, 我有
Yǒu ge wàiguó xiǎopéngyou shuō, wǒ yǒu
Iu fremdlanda amiketo diris, mi havas
三个 愿望: 第一, 得到 一 本
sān ge yuànwàng: dìyī, dédào yì běn
tri dezirojn: unue, ricevi unu ekzempleron
《毛 主席 語录》; 第二, 得到 一个
Máo Zhǔxí Yǔlù; dìèr, dédào yige
Maŭ-Prezidantaj Vortoj; due, ricevi unu
毛 主席 象章, 第三, 我 要
Máo Zhǔxí xiàngzhāng; dìsān, wǒ yào
Maŭ-Prezidantan portretinsignon; trie, mi deziras
到 中国 去, 到 北京 去, 看看
dào Zhōngguó qù, dào Běijīng qù, kànkàn
al Ĉinio iri, al Pekino iri, vidi
伟大 領袖 毛 主席。
wěidà língxiù Máo Zhǔxí.
grandan gvidanton Maŭ Prezidanto.

TRADUKO

Deziroj de Iu Fremdlanda Amiketo

Iu fremdlanda amiketo diris: Mi havas tri dezirojn. Unue, ricevi ekzempleron de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*; due, ricevi unu insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ; kaj trie, iri al Ĉinio por vidi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ en Pekino.


Noto: En tiu ĉi numero estas aldonita *Ŝlosilo al la Hanlingva Fonetika Alfabeto* por konsultado de la legantoj en sekvontaj lecionoj.

KIEL SKRIBI ĈINAJN IDEOGRAFIAĴOJN?

Ĉe la ĉinaj ideografiaĵoj estas jenaj ok bazaj strekoj:

- 1. punkto 丶
- 2. horizontalo 一
- 3. vertikalo 丨
- 4. fleksoj ㇇ ㇈
- 5. maldekstra oblikvo ㇏
- 6. dekstra oblikvo ㇐
- 7. leviĝa oblikvo ㇑
- 8. hokoj ㇒ ㇓ ㇔

La pintaĵoj de la strekoj estas farataj per levado de la skribilo (peniko). La direkton de ilia strekado montras la sagpintoj en la suba bildo:



Ĉiu ideografiaĵo estas skribata laŭ jenaj reguloj de ordo:

1. Supraj strekoj estas farataj unue kaj la malsupraj laŭvice poste. Ekzemple:
三 sān (tri) 一 二 三
看 kàn (rigardi) 一 二 三 丿 ㇇ 看 看 看 看
2. Strekoj en maldekstra flanko estas farataj antaŭ tiuj en la dekstra. Ekzemple:
他 tā (li) 丨 丨 丨 他
好 hǎo (bona) 丨 丨 丨 女 女 好 好
3. Horizontaloj estas skribataj antaŭ vertikaloj, kiam ili kruciĝas aŭ intertuŝiĝas. Ekzemple:
干 gàn (fari) 一 二 干
井 jǐng (puto) 一 二 卩 井
4. Kiam dekstraj kaj maldekstraj oblikvoj intertuŝiĝas aŭ kruciĝas, la maldekstraj estas skribataj antaŭ ol la dekstraj. Ekzemple:
人 rén (homo) 丨 人
衣 yī (vesto) 丨 丨 才 衣
5. Eksteraj strekoj estas skribataj antaŭ ol la internaj. Kiam la eksteraj strekoj plene enfermas la internajn, la suba horizontalo, tamen, estas skribata plej laste. Ekzemple:
句 jù (frazo) 丨 丨 句 句 句 句
同 tóng (sama) 丨 丨 同 同 同 同
四 sì (kvar) 丨 丨 四 四 四 四
国 guó (lando) 丨 丨 国 国 国 国

Sur la kovrilo:

La kampara junulo parolas pri konstrua projekto de nova socialisma kamparo kun la intelekta junulo, kiu ĵus venis por fikso-lôgi.

Sur la dorskovrilo:

La Nankina Jangzi-pontego

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (129) 1969

Ĉefa Enhavo

La Direkto de la Junula Movado

La Revoluciaj Junuloj de la Mondo Varme Amas la Pen-
son de Maŭ Zedong

Himno al Ŝaŭŝan (*poemo*)

Al la Vasta Mondo de la Kamparo

Marŝado al la Stepoj tra Mil Lioj

En la Tagoj de Kombiniĝo kun la Laboristoj, Kamparanoj
kaj Soldatoj

Fariĝi Ordinara Kamparano

Epizodoj en la Alta Tajdo de Iro de Intelektaj Junuloj
al la Kamparo

Studento Bonvena al Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj
Mezkamparanoj

Agi laŭ la Penso de Maŭ Zedong

Ekfunkcias la Hidraŭlika Elektrejo de Fuĉun-rivero

Plene Konstruiĝis kaj Malfermiĝis al Trafiko la Nankina
Jangzi-pontego

Ruĝa Signal-lanterno (*pekina opero*)

La Plej Alta Komandejo de la Tajlanda Popola Liberiga
Armeo Proklamis Sian Fondiĝon

Komsomolo de Sovetunia Reviziismo Estas Instrumento
por Restaŭri Kapitalismon

Lecionoj de Ĉina Lingvo


Ruĝa Virina Taĉmento

(Silkaj Homfiguroj)

La metiarta verko de silkaj homfiguroj "Ruĝa Virina Taĉmento" estas kreita de pekinaj metiartistoj, adaptante foton pri la dua sceno de la revolucia modela teatraĵo, la baledo *Ruĝa Virina Taĉmento*, laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke literaturo kaj arto devas servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la proletara politiko.


La baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* priskribas la kreskadon de iu taĉmento de la Laborista-kamparana Ruĝa Armeo, ba-


talanta sur Hajnan-insulo, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito. La baledo sukcese figurigis la heroojn Vu Kinghua, Hong Ĉangking k.a., prezentante la flamantan revolucion bataladon de la ĉina popolo kaj montrante, ke la subpremaj klasoj kaj popoloj povas akiri ĝisfundan liberigon kaj sinturni supren, nur se ili prenas pafilojn kaj iras la vojon de armita revolucio.



Novaj Fruktoj sur la Industria Fronto

La Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko sukcesis konstrui gigantan bormaŝinon por profundaj truoj.





La Nankina Jangzi-pontego estas finkonstruita kaj plene malfermita al trafiko.

La revoluciaj laboristoj de la Trakmeta kaj Pontokonstrua Taĉmento de la Unua Fervoja Konstrua Buroo projektis kaj fabrikis la unuan en nia lando trakmetan maŝinon de tipo 68-25, kiu kapablas sterni trakojn kun ferbetonaj ŝpaloj.



